ISSN 0023-3692

# kontakto



## La Tria Mondo... kaj aliaj

trimonata revuo de tejo
tutmonda esperantista junulara organizo

numero 64 (1979:4)

# kontakto

**REDAKTOROJ:**
Dario Besseghini, Stefan MacGill

**KONSTANTAJ KUNLABORANTOJ:**
Csaba Finta, Jugoslavio; Miguel Gutierrez Adúriz, Marteno Ruiz Altaba, Hispanio; Michael Lennartz, Germana DR; Jan Koszmaluk, Pollando; Anna Brennan, Nederlando.

**ADRESO DE LA REDAKCIO** (por ĉiuj kontribuaĵoj krom la tentaklaĵoj): "Kontakto", Dario Besseghini, Casella Postale 210, I-56100 Pisa, Italio.

**ADRESO DE LA ADMINISTREJO:** Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. (010) 36 15 39; pĉk 37 89 64 de ĝiroficejo Den Haag.

**Artikoloj, leteroj al la redakcio kaj reagoj al tentakloj estas bonvenaj. Bv. ĉiam tajpi unuflanke de la papero kun duobla interspaco kaj larĝaj marĝenoj.**

| | |
|---|---|
| **Abono de "Kontakto" (sen membreco) por 1980......** | **16,50 gld.** |
| **Unuopa ekzemplero de "Kontakto"..........................** | **4,00 gld.** |
| **MJ-K: membro de UEA/TEJO, malpli ol 26-jara, kiu ricevas Jarlibron kaj "Kontakto"n ..................** | **22,00 gld.** |
| **MA-K: membro malpli ol 26-jara, kiu ricevas Jarlibron, "Esperanto"n kaj "Kontakto"n ..................** | **55,00 gld.** |
| **Patrono de TEJO (sen aĝlimo), kiu ricevas "Kontakto"n kaj "Koncize" .......................................** | **33,00 gld.** |

**Ekzistas kotizoj en multaj naciaj valutoj, kiuj validas ĉe pago al la kotizperanto de UEA en via lando. Tiuj perantoj akceptos viajn abonojn, aliĝojn kaj mendojn rilate al "Kontakto".**

**Anonctarifo: 120 gld. por tuta paĝo, 70 gld. por duona paĝo; 40 gld. por kvarona paĝo. Anoncetoj (sen kadro) po 0,25 gld. por ĉiu vorto (aŭ po 1 internacia respondkupono por 3 vortoj).**


# enkonduko

Unue, ŝanĝoj en la familio. Nia redaktoro Giulio Cappa retiriĝas pro profesiaj devoj en nova posteno ĉe la itala regiona televido. En najbara lando Ĝim Kuŝino pro preterpaso de memproklamita aĝlimo petas demision el la listo de konstantaj kunlaborantoj. Spomenka Štimec solidarecas kun tiu deziro (rilate al si mem). Forfalas do du nomoj, kiujn vi regule vidis kiel aŭtoroj de viglastilaj artikoloj. La nomon de Giulio vi ne vidis tiom en aŭtora loko, ĝi staris tamen nevideble malantaŭ tuta stoko da artikoloj tra la lastaj ok numeroj, kiujn li sukcesis varbi. TEJO al ĉiuj tri direktas dankojn, des pli forte, ĉar ĉiu pretas plu ricevi la verkcirkulerojn kaj kontribui laŭ la eblecoj. Kiel vi legis en la lasta *Kontakto* (p.5), Ĝimo eĉ kunmetos por ni numeron pri ekonomio venontjare. Jen plia kazo de la principo "Mi retiriĝos por resti"!

Kaj nun pri alvenoj. Ni bonvenigas novan redaktoron, Dario Besseghini. Ni do ŝanĝas redaktoron, sed ne landon. Pli ol bonvenigo ne necesas, ĉar Dario mem verkis sinprezenton kiu aperas sube, kaj artikolon, kiu sekvas sur paĝo ses. Tra la "interregna" periodo la redakta mano de Charles Power aparte diligentis kaj meritas dankon. Notu, ke Dario transprenas la adreson de la redakcio kaj okupiĝos unuavice pri varbado, ricevo kaj redaktado de manuskriptoj. Proponu do kunlaboron kaj petu verkcirkulerojn de li.

Vi trovos kun ĉi tiu revuo voĉdonilon por la konkurso "Verko de la Jaro" organizata ĉiujare de "Literatura Foiro". La premiado de tiu konkurso okazis nun tri jarojn kadre de nia Internacia Junulara Kongreso. TEJO kaj LF ĉi-jare interkonsentis larĝigi la nombron de voĉdonrajtigitoj. Ĉiu leganto de *Kontakto* rajtas partopreni la voĉdonon laŭ la kondiĉoj priskribitaj sur la voĉdonilo. Legu do la librojn kaj ankaŭ via voĉo influu, kiu el ili fariĝu la Verko de la Jaro 1979.

Ni disĵetis tra la Movado sufiĉe vigle informojn pri nia nova kotizo-oferto. Ekde 1980 ĉiu **nova** membro de TEJO inter la aĝoj de 10 kaj 18 ricevos kontraŭ unu kotizo dujaran membrecon! Apenaŭ plu necesas krii ĉi tie pri la oferto. Tamen, jen plia instigo! Montru *Kontakto* kaj *Koncize* al pli junaj esperantistoj. Esploru ĉu validas por ili la oferto. Se jes, nepre kuraĝigu ilin membriĝi. Se ne, tamen kuraĝigu ilin!

Pri la temo de ĉi tiu numero. Duafoje nun nia jarfina numero sidos en la dokumentujoj de la Internacia Seminario de GEJ. Kiel lastjare, ni estis inunditaj per artikoloj. Paroli pri la kvanto, kvalito kaj vario, la juneco kaj multlandeco de la kontribuintoj estus jam kliŝe kaj tede; mi do pluverkos dek liniojn pri tio, kiujn la teknika redaktoro forigos per amuza, sed instrua pritema bildaro. Jes, fakte, la 14 artikoloj, ricevitaj de 9 a... kun me... aĝo de nur ...idujo,




ev... ..., artiko de la konsci... rimarkinda prezento de la temo el pluraj kulturaj ... kaj atestas ankoraŭfoje kiom mirakla estas la Internacia Lingvo.

smg ■

## SINPREZENTO

Atentaj legantoj de la pasinta numero povis rimarki, ke nova nomo aperas sub la vorto "redaktoroj". La novulo estas menciita ankaŭ interne. Rapida rigardo fine de ĉi tiu alineo ebligos al vi konstati, ke verkis ĉi sinprezenton ĝuste li. Unue, li aĝas 19 jarojn, do li estas iom pli juna kaj eble iom pli freneza ol la plimulto de la TEJO-membroj. Due, li havas gravajn taskojn en sia Landa Sekcio de TEJO, kaj pri landsekcia vidmaniero ne volas rezigni — kio signifas ankaŭ, ke li strebos al taŭgeco de la revuo ĝuste en tiuj landsekciaj medioj, kiuj ne tute verdiĝis kaj plu konservas interesojn kaj engaĝojn en la ekstera mondo...eĉ se por tion fari en *Kontakto* oni ne devas multon ŝanĝi, ĉar ĝi estas ĝuste jam revuo, kie aperas artikoloj pri la problemoj de la neverda mondo. Trie, en sia universitato li studas matematikon, konservas intereson pri sciencaj problemoj, kaj kredas havi sciencan pensmanieron...sed mi laciĝas paroli pri li. Se vi juĝemas, atente tralegu la venontajn numerojn de tiu ĉi trimonata retrimonatiĝinta revuo de TEJO kaj juĝu el lia laboro. Se vi plue volas eĉ interkonatiĝi kun li, serĉu dum la venonta kongreso okulvitran pipfumanton. Se vi verkemas, li presigemos viajn verkojn — se vi kritikemos, li akceptemos la kritikojn. Ĉiukaze ne forgesu lian nomon (kiun li ne ŝatas esperantigi):

**Dario Besseghini**

# Kiom da kilometroj al la tria mondo?



**de Gerald Roemer, FR Germanio**

Rigardu la mapon! Kie estas la Tria Mondo, kie la Unua aŭ Dua? Kie estas la limoj, kiuj estas la popoloj, kiajn ekonomiajn sistemojn ili havas, kiajn haŭtkolorojn, kulturojn, religiojn? Do, ĉu vi trovis ĝin? Kiom da kilometroj kuŝas inter ni kaj ili? Konfesu, ke tion vi ne scias!

La Tria Mondo estas sur nia mondo, ĝi eĉ estas ĝia plej granda parto. Vivas tie du trionoj de la terloĝantoj, kaj ilia nombro kreskas pli rapide ol ie ajn alie. Ĝi posedas la plej grandan kvanton de nafto, kaj de aliaj valoraj krudmaterialoj, de fruktoj kaj aliaj bongustaj agrikulturaj produktoj, de malmultekostaj laboristoj. Kaj belajn ekzotikajn artaĵojn. Sed oni povas rigardi ĝin ankaŭ de alia flanko: La Tria Mondo havas nur 18% de la mondaj produktaĵoj, nur 9% de la eksportoj, nur 2% de la esplorado kaj evoluigo. Sekve, ĉion alian faras la Unua kaj Dua Mondoj.

Kiuj estas la du mondoj, kiuj posedas tiel multe, kvankam ili havas nur malmultajn loĝantojn kaj relative malgrandan terenon? Oni tiel nomas la industriajn kapitalismajn kaj socialismajn ŝtatojn. Kaj kiel oni povas priskribi la Trian Mondon? Nu, ĝi estas la resto. Ĝi estas niaj iamaj kolonioj. Ĝi estas fora loko, kien riĉuloj flugas por mortpafi sovaĝajn bestojn. La gazetoj skribas pri revolucioj, pri Idi Aminoj, persekuto kaj torturo de opoziciuloj, militoj. Oni aŭdas ankaŭ pri malsato, pri mortoj pro malsato, pri miloj da mortintoj pro malsato. Iam vi rimarkos, ke en tiuj landoj vivis homoj. Vivis, ĉar multaj jam mortis, ĝis la novaĵo fariĝis sufiĉe valora, ke oni diskonigu ĝin. (Lasta ekzemplo estas Kampuĉeo). Kaj vi pripensos la situacion de tiuj homoj kaj la sekvontan tagon sendos iom da mono al la Ruĝa Kruco. Vidu, per tiu ago la Tria Mondo jam iom alproksimiĝis, sed kiom da kilometroj restas ankoraŭ?

Komence mi skribis, ke la Tria Mondo estas riĉa je multaj aĵoj. Tamen homoj vivas en malbonaj cirkonstancoj. Kial? Jen du ekzemploj por ne tro teorie klarigi tion.

### EKZEMPLO UNU: GVATEMALO

La lando estis tradicie liveranto de grenoj por Honduraso, Salvadoro, Kosta-Riko kaj Panamo. Hodiaŭ ĝi havas deficiton je grenoj, kvankam la agrikulturo mirinde kreskis. Ekde 1968, 60% de la iamaj grenkulturejoj fariĝis suker- kaj koton-plantejoj aŭ brutbienoj. La lukto por pli grandaj profitoj, kaŭzita de altigo de borsoprezoj por tiuj produktoj, estas la kaŭzo. La agrikulturo ne plu produktas por la bazaj bezonoj de la regiono, sed por la industrilandoj. Fariĝis tiel, ke maizon, la ĉefan manĝaĵon de la malriĉuloj, oni devis importi el Usono — je prezoj, kiujn oni ne plu povis pagi. Alia konsekvenco de tiu produktado por la eksporto estis pli malgranda nombro de laborlokoj sur la brutbienoj kaj sezona senlaboreco sur la plantejoj.

### EKZEMPLO DU: BRAZILO

Unu hektaro da sojo povas nutri homon por 5495 tagoj. Se oni kulturas tritikon tie, la sama ejo sufiĉas por 2166 tagoj, kaj se oni paŝtas bovojn, ĝi donas nutraĵon nur por 190 tagoj. Brazilio de 1968 ĝis 1974 altigis sian produktadon de sojo de 775 000 tunoj al 7 700 000 tunoj. La malbona nutrado de multaj infanoj en Brazilo estas do evitebla! Sed sojon oni ĉefe eksportas en la industrilandojn. Tie oni nutras la brutaron per ĝi por produkti viandon. En la libera-merkata ekonomio ne decidas la homa bezono, sed la aĉetpovo.

Se oni analizas la ekzemplojn laŭ diversaj vidpuntkoj, oni povas konstati kelkajn paralelojn:

1. La du landoj povus nutri siajn enloĝantojn, se ili plantus difinitajn rikoltaĵojn.
2. En la agrikulturaj terenoj oni grandparte produktas por la eksporto al la industrilandoj (ankaŭ en aliaj landoj, kie oni kulturas kafon, teon, kakaon, bananojn ktp.), ĉar tio donas pli grandan profiton.
3. En la industrilandoj la produktoj ne apartenas al la bazaj nutraĵoj (pano, lakto, terpomoj), sed estas luksaj varoj aŭ servas por produkti ilin.

Kio do estas tro ĉe ni, mankas en alia formo en la Tria Mondo, pro tio, ke la produktado, distribuado kaj konsumo de nutraĵoj dependas de ilia profitebleco. Per aliaj vortoj: temas pri ĉefe ekonomia procedo, kiu dependas de financaj interesoj anstataŭ de socialaj vidpunktoj. Tial unu triono de la homaro (1,4 miliardoj) malsatas kaj alia triono bone vivas aŭ suferas je tropezo.

La Tria Mondo estas tre proksima al ni ĉiuj! Ni estas unu mondo — kaj ne tri — en kiu homoj strebas por pli bona, senchava vivo. Ni respondecas unu por la alia en kaj inter la sistemoj, kiujn ni kreis por ni en la daŭro de la historio, kies strukturojn kaj nian sintenon al ili ni devas ĉiam denove kontroli. Se estas evidente, ke ili malbone funkcias — kaj pri tio mi donis du ekzemplojn — ni devas ŝanĝi la strukturojn. Niaj interrilatoj kun la Tria Mondo, ĉefe ekonomiaj kaj politikaj, havas malbonajn rezultojn por la homoj, kiuj vivas tie. Tre gravas, ke ni faru ion por la homoj kaj popoloj, kiuj vivas en malbonaj cirkonstancoj: donante monon al organizoj, kiuj helpas al malsatantoj, pensante pri nia propra vivstilo, laborante en grupoj, societoj, partioj por pli bona estonteco por ĉiuj. La Tria Mondo komenciĝas ĉe ni!





# Fragmentoj el taglibro

**de Csaba Finta, Jugoslavio**

**Universala Tempo 60917 04 117 35**

Hodiaŭ ni ekvidis Ilin. La simileco estas eĉ pli granda ol la supozita. La biologoj tuj komencos la teleesploradon. Poste venos la esploristoj pri la scienca kaj teknika nivel-oj. Fine ni eklaborigos la kontaktestablan grupon. Paralele kun ĉio ĉi agas la psik-socianalizistoj. Terure urĝas nin ĉiujn la scivolemo.

* * *

**Universala Tempo 60917 04 127 62**

Ni interkonsentis, ke mi notos la rezultojn de la psik- kaj socianaliza grupo, ĉar tiuj ĉi esploroj estos la plej longe-daŭraj.

Jam la unuaj supraĵaj observoj donas la impreson, ke Ili estas iel dividitaj — ne en tiu senco, ke Iliaj pensondoj ne formas koheran unuon traplektantan la tutan loĝantaron, ebligante tiele la plej intimajn pensinterŝanĝojn, kunlaboron kaj harmonian vivon, sed ke la unuopuloj nature, kvazaŭ denaske apartenas al diversaj grupoj, pli aŭ malpli grandaj, okupantaj certan parton sur la tera parto de la Planedo, kaj ke tiuj grupoj inter si havas diversajn opiniojn, ne malofte eĉ kontraŭajn, malamikajn. Ŝajnas, ke preskaŭ ĉiuj grupoj apartenas al iu ĉefgrupo, bloko, de kiuj estas eble tri aŭ kvar, kvankam la anoj de la plej nombra grupo (bloko) forpuŝas de si la pensojn pri blok-aneco, forte akcentante la apartiĝon disde la aliaj du — inter si kontraŭopiniaj — blokoj. Laŭ mia supozo tiu tria grupo devas esti sufiĉe evoluinta (ankaŭ psike, ĉar ili komprenis, ke la ĉefa kondiĉo por plupaŝi antaŭen estas la harmonia kaj paca kunekzistado — eĉ se Ili ankoraŭ ne malkovris la telepatiajn fenomenojn).

* * * *


**UT 60917 04 136 40**

Niaj ceteraj esploroj celas malkovri la ligojn inter tiuj tri 'ideaj grupiĝoj aŭ blokoj'. Ĝis nun jam evidentiĝis, ke la du kontraŭaj blokoj pro ia idea koncepto estas tre malsamaj, kaj ĉi tiu 'io' estas iaspeca kaŭzo por la artefarita ekscitado de la fajro de l'malamikeco inter ili du. Ĉiu flanko kredas (aŭ eble nur asertas), ke ĝi vivas pli bone, pli juste ol la kontraŭa 'partio'. Ĉi tiuj pensoj por mi estas tre fremdaj, nur opake percepteblaj. Mi havas ian senton, ke ili faras eĉ sinpropagandon kun samtempa akuzado de la alia flanko — la celon por mi kovras nebula vualo. Ĉu per tiuj akuzoj kontraŭ la aliaj ili volas pruvi la kulpecon de la 'malamikoj', elmontri la mankojn de ties opinioj kaj socio, preskaŭ devigante tiujn helpi en la evoluado la akuzantojn kaj tiel atingi la nivelon de la tria flanko (ĉar nun mi jam preskaŭ tute certiĝis, ke Ili staras plej proksime al la starto sur la vojo kondukanta al la konatiĝo kun la plej diversaj kulturaj — kaj preskaŭ ĉiam bonintencaj, amikaj — estaĵoj de la vasta Universo)? — mi ne scias. Kaj cetere — tiu tuta rilataro estas tre mistera.

* * * *

**UT 60917 04 156 81**

Nia lasta eksciaĵo pri la du kontraŭaj flankoj estas terura, eĉ timiga: ili posedas tre diversajn kaj potencajn ilojn, kiuj kapablus neniigi ankaŭ la tutan Planedon! Horore! Kaj kelkfoje ni perceptis ankaŭ tian situacion, kiam mankis vere nur sparketo... Estas mirinde, kiel venis la




triablokanoj tiel malproksime for de la pensoj pri malamikado en la rekta najbareco de tiuj malpacemuloj.

* * *

**UT 60917 04 188 07**

Verŝajne ni baldaŭ ekkontaktos kun la triablokanoj. Ilia sento pri justeco kaj amikeco forte superas tiun de la aliaj du. Kvankam ni informiĝis pri kelkaj lokaj kvereloj (bataloj?) sur iliaj vivregionoj, mi tamen kredas, ke tio estas nur la konsekvenco de la enmiksiĝemo far la aliblokuloj, spuro de ilia historia postresto ĉe la tria-uloj mem. Ni atendos iom ĝis ĉio kvietiĝos, kaj tiam oni povos komenci la kontaktoserĉon.

* * *

**UT 60917 04 257 39**

Ĉi tiuj kvereloj kaj bataletoj jam longe daŭras. Ni ne povos tiel multe atendi. Post la konsultiĝo kun la grupo priesploranta la sciencan kaj teknikan nivelojn, ni faros konkretajn paŝojn cele de la atingo de pacaj kontaktocirkonstancoj.

* * *

**UT 60917 04 267 94**

Kompleta seniluziiĝo! Evidentiĝis, ke ĝuste tiu tria bloko estas la teknike kaj science plej subevoluinta. Ĉi tio estas malvarma duŝo por ni. Kaj ĝi kompreneble tuj malaktualigas la preparojn pri la kontakto. Sed kio estu nun la sekva paŝo? Ĉu helpi, enmiksiĝi, aŭ senspure retiriĝi kaj trovi pli saĝajn partnerojn? Eble ni longe devos serĉi ĝis ni denove trovos iajn kulturajn estaĵojn, sed ja ankaŭ la 'elkuracado' de ĉi vivuloj estos longdaŭra. Mi plej volonte helpus al tiuj triablokanoj, ĉar ili vivas en tre malfavora pozicio. Nia Konsilio por Intervenoj kaj Kontaktoj baldaŭ kunsidos kaj verŝajne havos ankaŭ iom konkretajn decidojn, sed ĝis tiam ni devas daŭrigi la esplorojn, provante malkovri la kaŭzojn de la ekesto de Ilia nuna socia sistemaro kaj interrilatoj (denove mi majuskle mencias Ilin, celante tiel la tutan loĝantaron de la Planedo kiel unu tutan genton, kaj ne nur unu el la blokoj). Kaj eĉ se ni eble ne helpos, ni devus montri al Ili la vojon, kiel elvadi el ĉi marĉo de malegaleco.

* * *

**UT 60917 04 296 82**

La esploroj, informkolektado kaj analizado plu daŭras. Pli kaj pli klariĝas la situacio, kaj se ni bone komprenis ĉion, la kaŭzoj de ĉi tia evoluo, 'klasiĝo' sur la Planedo estas pluraj: ŝajnas, ke la triablokanoj iel volas liberiĝi disde la enmiksiĝo, helpodono far la aliaj du, kvazaŭ aspirante la kompletan sendependecon, liberon, preferante la subevoluintecon al la kultura, ekonomia kaj aliaj dependoj. Alia grava faktoro estas amasfabrikado de la detruaj kaj mortigaj laboriloj (tamen ŝajnas al mi, ke ili tute ne servas por laboro, nur ekskluzive por la reciproka mortigado, neniigo). Ne estas neglektebla ankaŭ la fakto, ke la fendo inter la pli kaj la malpli evoluintaj eksponenciale kreskos, se oni faros nenion por la egaligo de la niveloj. Kaj ĉi tie – laŭ ĉiuj signoj – mankas eĉ tiucelaj streboj far la plipotenculoj. Sed kiel ĉefan kaŭzon mi listigus la ecojn de l'vivuloj triablokaj: la vantecon, la mallaboremon kaj ion, kion Ili nomas religiemo (tre malklara nocio por mi, mi devas konfesi; la kernon formas iaj ĉiopovaj fortoj, superecaj estaĵoj – ne maleble, ke Ili aludas pri ni).

Nia tasko estos fari iajn modifojn, ŝanĝi ion pli profundan en la karakteroj, sed tiel, ke oni nenion rimarku, eĉ ne konjektu. La efektivigon ni tuj komencos, ĉar ni devas pluveturi. Tro longan tempon ni pasigis ĉi tie.

* * *

**UT 60917 04 316 13**

La interveno okazis laŭplane. La forvojaĝaj preparoj jam finiĝis; ĉiuj instrumentoj, motoroj estas ekirpretaj. En ĉi tiu momento ni forlasas la orbiton de la Planedo. Ĝis la ceteraj okazaĵoj la taglibro provizore finita:

*Ahoi-raks-8 Uta, notisto*

* * *

Citaĵo el la ĵurnalo *Nova Heroldo*, 1997-08-21: "Laŭ la lastaj informoj de UNESKO la nombro de la analfabetoj en la tuta mondo estas sub unu miliono... Afriko kaj Azio ne plu bezonas fakulojn el la evoluintaj landoj: iliaj propraj diligentaj inĝenieroj kaj teknikistoj semas la scion sur la fekunda grundo de la fervora 'indiĝena' aŭskultantaro..."

# La aglo kaj la fridujo



**de Dario Besseghini, Italio**

Lastatempe s-ro Jean Bedel Bokassa ĉesis esti la imperiestro de Centrafriko. Kelkaj gazetoj raportis, ke serĉante en lia kuirejo oni trovis en la fridujo pecojn de homa viando. Tiu sama Bokassa estis siatempe atinginta la unuajn paĝojn de la gazetoj tutmondaj per sia imperiestriĝa ceremonio, malbona imito de similaj pasintepokaj eŭropaj solenoj. Kiam mi estis eta infano, mi ludis esti la imperiestro de iu fantazia ŝtato, kaj konstruis al mi insignojn kaj 'honorajn uniformojn'. La 'oficiala' simbolo de tiu mia ŝtato estis aglo mirinde simila al tiu, kiu konsistigis la 'imperiestran tronon' de Bokassa. Je tiaj agloj estas plenplenaj la eŭropaj historilibroj kaj la 'historiaj filmoj': en Italio, ili revigis infanon; ŝajnas, ke en Afriko ili fariĝis simboloj de la eŭropa historio mem: kiu volas eniri en ĝin, konstruu al si agloforman tronon. Tion faris Bokassa, sed li sukcesis nur pajace imiti — cetere konforme al lia politika starpunkto entute servuta al Francio: forlasinte la propran kulturon, ne taŭgan por kapti potencon en la nuna mondo, kaj nenion komprenante pri la eŭropa kulturo. Li havis fridujon, kiel ĉiu bona civitano de industriiĝinta lando, sed li utiligis ĝin certe ne laŭ la industrilandaj kutimoj. Li havis la aglon, kiel ĉiu bona eŭropa imperiestro, sed mankis al li historia perspektivo.

La aglo kaj la fridujo povas esti du bonaj simboloj de la du elementoj de la eksportata 'eŭropeco': unuflanke historia heredaĵo, aliflanke teknologio. Ĉu ambaŭ elementoj nepre devas esti kune, ĉu triamondaj landoj povas alpreni unu el la du, estas baza problemo. Por kuraci afrikajn infanojn de la epidemioj, ĉu estas nepre necese instrui al ili ke "la Gaŭloj estas niaj prapatroj" (kiel fakte okazis en Eburbordo)? Ĉu afrikaj etnoj devas alpreni la eŭropan sociorganiziĝon de ŝtato por akiri 'panon kaj scion'? Ĉu nepre la ekskoloniaj lingvoj devas esti la rimedo, tra kiu pasas la eduko de triamondanoj?

La unuopaj problemoj tuŝitaj en la supraj demandoj estas nur parto de multe pli ampleksa kaj funde unueca problemaro, kiu estas ligita al grandioza historia procezo.

Dank'al kultura progreso sekve de gravaj sociekonomiaj ŝanĝoj en Eŭropo, eŭropanoj larĝiĝis la propran 'ĉasteritorion' ĝis englutado de la tuta mondo. Ekzistis la popoloj, kies aparta kutimaro ebligis vivon en demografia kaj ekologia ekvilibroj, kaj kies religio sanktigante tiujn ekvilibrojn permesis ilian plustaron. Tiuj, kiel ĉiuj aliaj popoloj, estis unue agresataj de amaso da plej diversaj uloj: sklavkomercistoj, misiistoj, aventuristoj, militistoj, ĝis eksplodo de akregaj konfliktoj kaj disvolviĝo de nova historia periodo. Kio nuntempe estas la 'Tria Mondo' estis transformata en rezervujon de homforto kaj naturriĉaĵoj por ke Eŭropo povu plufunkciigi la motoron de la propraj ekonomisistemo kaj sociordo.

Tiu procezo startis antaŭ kvar jarcentoj kaj, tra diversaj fazoj, daŭras ĝis nun. Ankaŭ la ekesto de Esperanto estas ereto de ĝi. Ĝi estas la unuiĝo de ĉiuj historiaj fluoj de la diversaj popoloj, antaŭe tute sendependaj, aŭ nur ĉerande tuŝiĝantaj. Praktike, ekde kiam eŭropanoj ekregis ĉie ajn, kien ili kapablis aliri, ili starigis lernejojn — ĉefe ekleziajn, precipe en la unuaj tempoj — kaj tie oni instruis la eŭropajn kulturon kaj historion. La popoloj, kiuj sekvis alian evoluon diferencan de la eŭropa, estis de tiam nomitaj 'primitivaj', adjektivo kiu poste fariĝis 'subevoluintaj' aŭ eĉ 'evoluantaj' (kio ne evoluas, pardonu?). El alia tino ĉiam la sama vino. Dume la 'gravitocentro de la povo' iom delokiĝis de Eŭropo al Nordameriko (Usono) kaj el la eŭropa kulturo ekstaris nova idearo kontraŭbatala al ĉio ĉi. Surbaze de tiu idearo oni fondis Sovetan Union, kiu fariĝis la dua 'gravitocentro de la povo'. Ni nomas 'Tria Mondo' tiujn landojn, kiuj estas 'sufiĉe diferencaj' de ambaŭ gravitocentroj. Evidente tio ne estas difino. Tio utilas nur al intuicio. Kiam mi en la postaj alineoj skribos 'Tria Mondo', mi celos precipe Afrikon, Latinamerikon kaj la nesovetian kaj neĉinan parton de Azio.

Oni povas rimarki, ke temas pri entute diferencaj mondopartoj, kaj ke kio ligas ilin estas ĝuste iliaj ekskoloniaj rilatoj kun Eŭropo/Usono. Kio plej impresas, estas, ke ĉe UN la reprezentantoj de tiuj 'evolulandoj' ne kontraŭbatalas eŭropigon, sed male petas 'evoluhelpon', kie 'evoluo' signifas neniam la daŭrigon de propra aŭtonome disvolviĝanta kulturo kun ties propraj evoluleĝoj, sed, kontraŭe, la iompostioman alprenon de la eŭropaj teknologio kaj mondbildaro. Eĉ la fakto, ke ili organiziĝis en ŝtatoj, estas eŭropa. Oni povas argumenti, ke la ŝtatoj estas heredaĵoj de la kolonia periodo, kaj ke ilin regas elitoj malsolidaraj al la propraj popoloj kaj lakeaj al la imperiistoj. Sed eĉ ŝtatoj, kie nete kontraŭimperiismaj fortoj alprenis la povon, havas industriiĝon kiel ĉefan oficialan celon — se ne laŭ la okcidenteŭropa modelo, almenaŭ laŭ la orienteŭropa. Ankaŭ la 'liberigaj movadoj' kiuj batalas — foje eĉ armite — kontraŭ la okcidenta imperiismo, tion faras nome de konceptoj kaj idearoj naskiĝintaj kaj disvolviĝintaj en Eŭropo. La avangardon


de tiuj liberigaj movadoj konsistigas ne homoj retenintaj la propran tradician kulturon, sed studentoj kaj kleruloj, kiuj en eŭropstilaj lernejoj lernis pri 'justeco, libereco, solidaro'. Nur posta fazo estas la revalorigo de la tradiciaj kulturoj kaj la starigo de 'kulturaj alternativoj' surbaze de ili. En kelkaj lokoj interalie ekzistas pli-malpli akraj konfliktoj inter la tradiciaj etnoĉefoj kaj la 'liberigaj movadoj', kiuj plejparte estas 'transetnaj'. En Sudafriko ekzemple la tradiciaj ĉefoj eĉ kunlaboras kun la blankula regantaro, tiel koliziante kun la kontraŭrasismaj movadoj.

Laŭ kelkaj aŭtoroj la 'industria revolucio' estas simila al la 'neolitika revolucio' de antaŭ dekmil jaroj. Same kiel preskaŭ la tuta mondo tiam en la relative mallonga tempodaŭro de preskaŭ jarmilo neolitikiĝis plene, tiel ankaŭ nun la transpaso al industria socio devus okazi rapide kaj mondskale. Post dekmil jaroj — oni argumentas — ne gravos, kiu popolo komence industriiĝis; gravos, ke la tuta mondo transpasis al komplete nova formo de civilizo! Tia longperspektiveco tamen povas forgesigi, ke en la nuntempo milionoj da homoj estas senigataj de la propra kultura identeco nome de materia plibonigo de la vivkondiĉoj.

Laŭ mia kompreno, la 'kulturo' de iu etno konsistas el tri diversaj eroj:

1. *Aro da konceptoj*: religiaj kaj moralaj valoroj, ideoj pri la fizika mondo, pri la propra historio, plej diversaj idealoj unuflanke, sed ankaŭ, aliflanke, kio estas nomata 'kolektiva nekonscio'.
2. *Aro da kutimoj*: konkretaj kondutoj, ritoj, tradiciaj ceremonioj, 'manieroj fari aferojn' sed ankaŭ nutriĝkutimoj, kuracmetodoj, agrokultivaj teknikoj, ktp.
3. *Aro da instrumentoj*: la tradiciaj instrumentoj kun ties konstru- kaj uz-teknikoj.

La evoluon de kulturo permesas la dialektikaj rilatoj inter la tri supraj aroj, kaj inter kulturo ĝenerale kaj la siavice ŝanĝiĝanta sociordo. Alian evolufaktoron, kiu laŭ kelkaj aŭtoroj estas la ĉefa, konsistigas la rilatoj kaj kulturinterŝanĝoj kun la aliaj popoloj. Kiel en fiziko de



unu koordinatsistemo oni mise vidas tion, kio okazas en alia sistemo, tiel per la 'konceptoj' de unu kulturo oni povas nur ege malbone kompreni la valorojn de alia kulturo. La signifon de vortoj kiaj 'bona, malbona, utila' ktp. difinas nur la valoraro de ĉiu unuopa kulturo: ne estas eble, el pure logika vidpunkto, aserti ke mi 'plibonigas la vivkondiĉojn' de afrikano vendante al li fridujon. Cetere ne estas honeste instrui al li respekti la 'aglon' (eventuale kun la motivo 'riĉigi lian spiriton') nur por poste vendi al li la fridujon.

Se nia celo estas 'libereco' de ĉiuj popoloj de la mondo, tiam en la kultura kampo tio povas signifi nur, ke ĉiuj

**LASTMOMENTA NOVAĴO:**

*11a de decembro: Per telefonalvoko el Strasburgo estas hodiaŭ konfirmite, ke peto de TEJO por okazigo de kolokvo en la Eŭropa Junulara Centro (sub gvido de Eŭropa Konsilio) estas akceptita kaj enskribita por la datoj 15 — 22 junio 1980. La temo de la kolokvo estos 'Aplikado de Esperanto' kaj havos tri subtemojn: 1) Instruado de Esperanto; 2) Gvidado de junularaj grupoj; kaj 3) Praktika utiligo de Esperanto. Estos lokoj por ĉ. 20 partoprenantoj el niaj Landaj Sekcioj. Pli da gvidantoj estas ankaŭ bezonataj. Pliaj detaloj sekvos.*

realproprigas sian kulturon, sian manieron koncepti la mondon, siajn tradiciajn valorojn. Sed en ĉiu popolo ekzistas progresemuloj kaj konservemuloj. En la kultura kampo, la progresemuloj strebas al evoluigo kaj ĝisdatigo de la tradiciaj valoroj kaj eventuale al disrompo de kelkaj el ili surbaze de aliaj. Male, la konservemuloj preskaŭ ilin sanktigas en iliaj praformoj, eble sekrete revante pri halto aŭ inversiĝo de la historifluo. Ekzistas grava risko ke la ĝeneralan strebon al realproprigo de sia kulturo gvidus ĝuste la konservemuloj, kaj ke por 'gardi la purecon' de la tradiciaj formoj oni klopodus haltigi ajnan internan evoluon. Kiel ni vidis, ankaŭ la kultur-interŝanĝoj estas gravegaj por evoluo, kaj nuntempe estas jam neeble, ke iu popolo vivu tute senrilate kun aliaj — kaj mi persone ne bedaŭras tion. Se tiel estus, interalie Esperanto fariĝus sensignifa...

La teruran komplikon de kulturaj demandoj en la Tria Mondo kaŭzas ĝuste tiu kontraŭdiro, ke oni unuflanke strebu al konservo de la etnaj identecoj, sed aliflanke, ke tion oni faru sen rasismo kaj sen nostalgioj pri nereatingebla forpasinteco. Se oni volas konstrui ideologion por la liberiĝo de triamondanoj, mi opinias, ke ĝia ĉefa ĉenero devus esti, ke la popoloj mem regu la evoluon de la propra kulturo kaj kontrolu la reciprokajn interŝanĝojn. Tion faru la popoloj, ne iliaj mastroj, ĉu tradiciaj, ĉu koloniismaj. Mi konscias, ke tio estas absolute eŭropa koncepto, kun precizaj radikoj en la eŭropa kulturhistorio. Trudi ĝin al la popoloj, kiujn ĝi rilatas, jam estas kultura imperiismo... kaj ĉe mia neeblo — kaj mia neŝato — foriĝi de mia kulturo mi devas ĉesigi miajn analizklopodojn.

Finfine, industriigo kreis enormajn problemojn ĉie ajn, kaj eble la situacio de suditala kamparano ne estas tiom diferenca de tiu de hindo. Jam en Eŭropo pluraj etnoj ekasertas, ke iliaj landoj estis koloniigitaj — se tio veras, jen ilia situacio estas eĉ pli malbona ol tiu de la triamondaj popoloj, kiuj almenaŭ politikan — se ne ekonomian — aŭtonomecon sukcesis atingi. Ĉu la 'Tria Mondo' estas ni ĉiuj? Certe ne, kaj kio diferencigas la malriĉan 'subevoluintan' eŭropanon disde la triamondano estas ĝuste la kultura flanko de la problemo. El la ekonomia vidpunkto, suda Italio estas — tute same kiel multaj triamondaj landoj — *homrezervujo por la industriiĝintaj regionoj.* La diferenco estas, ke la malriĉaj regionoj de Eŭropo apartenas al la sama kultursfero, kiu kreis la industriojn — ne estas absurde aserti, ke la diferencaj regionaj variaĵoj konsistigas tamen unu nuran eŭropan kulturon. Temas do pri internaj kontraŭdiroj. En la Tria Mondo, al la internaj kontraŭdiroj jam ekzistantaj en la diversaj regionaj kulturoj aldoniĝas la aliigklopodoj de la eŭropaj invadintoj... aŭ pli ĝuste invadantoj. La konfliktoj kaj fortoj sociaj kaj ekonomiaj en ĉio ĉi estas tiel ampleksaj kaj grandskalaj, ke homoj, kiuj travivas ilin, povas nur miri — kaj eble nenion kompreni. Ni nur estu dankaj, ke ni vivas en historia epoko interesa.

# Kultura imperiismo

Prelego de

Aĥmed Taleb Ibrahimi, Alĝerio



Foto: Unesko/Tessoro

En ĉi tiu sama salono en julio 1976 oni aprobis la Deklaron pri la Rajtoj de la Popoloj. Ĝi emfazas en sia unua parto ke "... ni vivas tempon de grandaj atendoj..." ĉar "... la liberigaj luktoj sukcesis renversi la kolonian sistemon...", sed "... ĝi estas ankaŭ tempo de frustriĝo kaj de malvenkoj, ĉar novaj formoj de imperiismo ekaperas."

La Deklaro pri la Fundamentaj Rajtoj de la Popoloj venis post alia internacia kunveno, kiu ankaŭ okazis en Alĝerio: la Konferenco de Triamondaj Ekonomiistoj. Ili asertas, en sia Ĝenerala Deklaro, ke: "... popoloj komprenis ke perfortaj luktoj, el kiuj rezultis politika sendependeco, estas nur unu el la ŝtupoj de la lukto por totala liberiĝo, kiu inkluzivas ekonomian kaj kulturan sendependecon". Ĉiuj ĉi tiuj kaj ankaŭ aliaj deklaroj estas kiel eĥoj de rezolucio, unuanime akceptita dum Pinta Konferenco de Nealianciĝintaj Landoj, kiun ni havis la honoron gastigi en 1973, kaj kiu donis eksignalon por vasta movado celanta starigon de nova internacia ekonomia ordo.

Post alpreno de ĉi-cela agad-programo dum Speciala Sesio de UNO oni opiniis, aŭ oni ŝajnigis opinii, en kelkaj medioj, ke estas eble alveni al starigo de nova monda ordo nur per konsiderado de ekonomiaj problemoj, kvazaŭ politiko, ekonomio kaj kulturo estus apartaj kampoj sen iu ajn interago. Oni devas agnoski ke dum la sesdekaj jaroj, markitaj per la akiro de sendependo de pluraj landoj, oni ne ĉiam emfazis la finon de kultura fremdiĝo kaj dependo. Sed hodiaŭ oni rajtas diri ke la sepdekaj jaroj kuntrenis kreskantan konsciiĝon pri la veraj kondiĉoj de sendependo kaj de kunlaboro. Sendependon kaj kunlaboron ni ne disigas.

Ĉiu nun scias ke:

- esenca bazo de sendependo de ĉiu lando estas aserto de ĝia kultura identeco;
- evoluo celas homojn kaj sociojn, en kiuj tiuj homoj partoprenas, kaj pro tio kulturo estas integra kaj esenca parto de ĉia ekonomia kaj socia evoluo;
- nova internacia ordo inkluzivas lukton kontraŭ internaciaj malegalecoj en ĉiuj kampoj, ĉar internaciaj rilatoj estas falsaj, kiam ili okazas ne inter egalaj partioj.

Mallonge, la batalo por ĉi tiu nova internacia ordo, bazata samtempe sur justeco kaj solidareco, devas pli kaj pli akiri totalan karakteron, ĉar post nia lukto kontraŭ milita kaj politika imperiismoj necesas ke la Tria Mondo kaj la tutmondaj progresemuloj ekkonsciu pri la granda danĝero, kiun prezentas kultura imperiismo.

Ne temas pri facila lukto, ĉar, kiel vi konstatis dum viaj laboroj, kultura imperiismo estas multspeca, disvastiĝinta kaj ofte hipokrita. Per senduba simpligo oni povus distingi minimume tri formojn de kultura imperiismo. Pri tiuj tri formoj rekta respondeco de triamondaj homoj, kaj tute aparte de iliaj gvidantoj, estas implicita je malsamaj niveloj.

Unuavice ekzistas formo de kultura imperiismo, kiu estas heredaĵo de kolonieco. Ĉi tie ne necesas memorigi pri tio, kio estis, dum la kolonia periodo, la fremdigo sur la kultura kampo. La simpozio okazinta dum la Tutafrika Kulturfestivalo en Alĝero en 1969 epitetis ĝin 'genocido de animoj'. Kiel kamparanoj estis prirabitaj je sia tero kaj elradikigitaj el sia vilaĝo por esti alĵetitaj al urbaj kaban-kvartaloj aŭ por esti kondamnitaj al elmigrado, aliaj sociaj grupoj estis fremdigitaj. Ili estis senigitaj je tio, kio konsistigas popolan animon: kulturo, lingvo kaj kredoj. Oni senigis ilin je ilia kultura identeco kaj oni elradikigis ilin el ilia medio. Per tio koloniismo igis tiujn, kiujn oni nomas 'elito', malaktivaj kaj psikologie malsanaj estaĵoj. Tion oni povus nomi *imperiismo per submetiĝo, demisio kaj veneniĝo.* La efiko de tiuj ideoj pri malplivaloro ne magie malaperas post sendependiĝo, se la socio ne estas mobilizita por revolucia projekto. La plej elementa formo de lukto kontraŭ ĉi tiu imperiismo-formo estas, kaj por elitoj kaj por amasoj, forĵetado de ĉia ideo pri malplivaloro, rifuzado de ĉia servanteca imitado de koloniistoj kaj de ilia ekonomia-politika sistemo.

Necesas ne plu esti konscia aŭ nekonscia imitanto kaj iĝi kreanto: kreado estas la ĉefa vojo, kiu kondukas al memstara kaj vera kultura evoluo. Necesas ankaŭ retrovi ligon kun sia propra estinteco, ne por plezurigi sin mem per kontemplado kaj paraliziga imitado de formoj de kultura esprimo apartenantaj al formortintaj epokoj, sed por aserti sian personecon kaj lanĉi sin al la estonteco – al kreado de nova socio por novaj epokoj.

Hodiaŭ imperiismo ne tiel facile kiel dum la kolonia periodo aperas sub sia brutala milita formo; ĝi ne plu intervenas rekte kaj sisteme je la politika nivelo, ĝi preferas tiri la fadenojn kaj estigi la disiĝojn, kiuj permesas al ĝi atingi siajn celojn. Tial ke la politiko de kanon-ŝipoj estas eksmoda, oni preferas vendi aŭ donaci kanon-ŝipojn al tiuj, kiujn oni elektis lanĉi kontraŭ malamiko, kiun oni deziras trafi sen rekta kompromitiĝo. Tia situacio povas ekesti kaj estadi nur tiom kiom difinitaj landoj trankvile akceptas la neklarajn rilatojn, kiuj apartenas al novkoloniismo. Sed ekzistas faktaj situacioj kiam eĉ lando, kiu asertas sian sendependecon, troviĝas antaŭ tio, kion oni povus nomi *imperiismo per infektado kaj konsumado*. Oni rajtas diri ke ĉia dominado, eĉ simple (se oni rajtas tiel diri) ekonomia aŭ teknologia dominado enportas en si kulturan imperiismon, kiel nubo enportas pluvon. Necesas multa atento por eviti ke teknika kaj kultura kunlaboradoj, importado de iloj kaj de teknologioj altrudu netaŭgan evolu-modelon, favoru lingvan dominadon, instigu cerb-elmigradon kaj, sub la masko de bonvola kunlaborado, konduku al nova dependo.

Kaj kion ni diru pri ĉiuj tiuj situacioj de monopolo aŭ de dominado, kiujn vi analizis ĉi tie, en kampoj tiel gravaj kiel informado, filmproduktado, eldonado, kie tro multaj

*Aĥmed Taleb Ibraĥimi estas unu el la triamondaj politikistoj, kiuj plej ofte kaj klare insistas pri la graveco de kultura imperiismo. Kiam li faris ĉi tiun paroladon, li estis Konsilanta Ministro de la Alĝeria Ŝtatprezidanto.*

*La titolo 'Kultura Imperiismo' estis aldonita de la tradukinto, Renato Korseti. La originalo havis la jenan titolon: "Ferma Parolado de Lia Ministra Moŝto Taleb Ibraĥimi, Konsilanto de la Ŝtatprezidanto". Ĝi estis farita okaze de la fermo de la Internacia Konferenco pri Kultura Imperiismo, okazinta en Alĝero de la 11a ĝis la 15a de oktobro 1977. Ekzempleroj de la parolado-teksto en la franca, angla, hispana kaj araba estis disdonitaj al la partoprenantoj. Tiu ĉi traduko baziĝas ĉefe sur la franca teksto (C.I.I.C./1/ALG./DOC.34).*

*La tradukinto deziras emfazi ke li aprobas ĉiun unuopan vorton de ĉi tiu parolado, kaj ke li tradukis ĝin, anstataŭ memverki ion, ĉar Taleb Ibraĥimi tre elegante diras ĝuste tion, kion li mem estus volinta diri – ankaŭ tradukado ne estas neŭtrala ago. En la ĉi-menciita Konferenco estis reprezentita ankaŭ la Esperanto-movado, kaj estis prezentita referaĵo pri la Internacia Lingvo. Se vi deziras plie informiĝi pri tiu ĉi faceto de la okazaĵo, bonvolu legi Giulio Cappa,* **Kultura Imperiismo: Kontraŭ Koloniigo de Cerboj**, *en la februara numero 1978 de la revuo 'Esperanto' de UEA.*

*Foto: La du junuloj sur la foto fakte sorbas el la bildstria libro informojn pri la laboro de Unesko. Sed 95-foje el cent ili ricevas de tiaj komunikiloj alispecajn mesaĝojn. Precize tion asertas la preleginto pri komunikado: "Tro multaj triamondaj landoj estas 90% aŭ 95% konsumantoj kaj nur malgrandeg-kvante kreantoj."*

triamondaj landoj estas 90 % aŭ 95 % konsumantoj kaj nur malgrandeg-kvante kreantoj.

La tria speco de kultura *imperiismo,* kiu okazas *per disvastiĝo,* povas iĝi vera 'medi-poluado'. Eĉ ekster ĉia hegemoni-volo milita potenco evoluigas teknologian potencon kaj ekonomia potenco evoluigas teknologian potencon. Kiel, sen nova internacia ordo, la Tria Mondo, kiu havas du trionojn de la monda loĝantaro sed disponas nur pri unu triono de la haveblaj produktaĵoj, povos ludi sian rolon en la gvidado de mondaj aferoj? Kaj kiel naciaj kulturoj povus eviti riskojn de submergo aŭ de aliigô pro la disvastiĝo de nur unu speco de civilizo, tiu de la plejfortuloj? Kelkajn fojojn oni parolas pri civilizo sen kulturo, pri civilizo estrata de tekniko kaj direktata al var-konsumado. Tion ni ne volas, sed, dum ekzistos vola aŭ senvola imperiismo, kiel ni povos certigi memstaran evoluon por niaj landoj, gardi la viv-kutimojn de la loĝantoj, iliajn kutimojn kaj ilian kulturon? Nia mempliuesto estas kondiĉo por dinamisma internacia kunlaborado. Tio veras same kiel veras ke por gastigi fremdulojn oni devas havi sian propran hejmon.

Certe, ĉi ĉion ni scias de longa tempo. Ne nur kultura malkoloniiĝo kaj aserto de kultura identeco estas sur la tagorda listo, kiel mi memorigis komence, ekde la sepdekaj jaroj, sed novaj ag-direktoj estis skizitaj por finĉesigi fremdiĝon kaj dependecon en kultura kampo.

Tiel, por citi nur kelkajn ekzemplojn, afrikaj ministroj respondecaj pri edukado, scienco, kulturo aŭ informado verkis agad-programojn en ĉi tiu kampo. Antaŭ iom pli ol unu jaro la Organizaĵo por Afrika Unuiĝo alprenis kulturan ĉarton, kiu, nur per si mem, se ĝi estus efektive aplikata en ĉiuj ĝiaj normoj, sonorigus la mort-sonorilon de ĉi tiu kultura imperiismo, pri kiu ni nun parolas. Cetere, en julio 1976, nealianciĝintaj landoj alprenis agad-programon cele al korektado de la neakceptebla malekvilibro ekzistanta en informad-kampoj inter evoluintaj kaj evoluantaj landoj. Sed la plej bonaj programoj, la plej noblaj deklaroj kaj la plej bone redaktitaj ĉartoj restos sen morgaŭo, se politika volo mankos. Temas pri obstina volo ĉar, kiel vi rimarkigis, kultura imperiismo ne estas vidata en la sama maniero fare de malsamaj sociaj grupoj; ĝia agado estas insida kaj disa, kaj pro tio ĝi estas ankoraŭ pli malfacile kontraŭbatalebla ol aliaj imperiismo-specoj. Kaj kion ni diru pri ĉi tiuj malfacilaĵoj, kiam kelkaj respondeculoj devas komenci ĉi tiun kontraŭbatalon ene de si mem?

Do, mi volus insisti pri ĉi tiu politika volo. Ĝi ne estas kreebla per leĝoj. Ĝi bezonas konsciiĝon, kiu kelkajn fojojn iras tra longaj padoj. Kunvenoj, kiel ĉi tiu, povas nur helpi la esprimon de la volo de la popoloj kaj de la gvidantoj de la Tria Mondo kaj de ĉiuj mondaj progresemuloj.

Kiam vi elektis ĉi tiun temon por viaj debatoj, vi ne serĉis interbatalan renkontiĝon, kvankam en difinitaj okazoj interbatalado estas al ni altrudata. Male, vi klopodis helpi la ekstaron de ĉi tiu nova internacia ordo, kiu certigos veran internacian kunlaboron inter ĉiuj landoj, grandaj kaj malgrandaj. En la sama maniero, kiel ne devos ekzisti nur unu decid-centro por la gvidado de mondaj aferoj, en tiu sama maniero oni devos certigi la ekziston de pluraj kulturaj areoj. Ni ne favoras unu-formigon kaj ni ne favoras sufokon de kulturoj, sed ni favoras la dialogon inter malsamaj kulturoj. Vera kunlaborado postulas reciprokan respekton, solidarecon kaj agnoskon de malsamecoj. Por la bono de la homaro universala civilizo povos ekzisti nur tra malsameco de kulturoj.

# Instruado en la Tria Mondo

**de Evgeni Georgiev, Bulgario**

Socia progreso en la ekskoloniaj landoj ne eblas en nunaj kondiĉoj sen estiĝo de nacia potencialo en la scienca kaj teknika sferoj. En la Tria Mondo estas pli ol 800 milionoj da analfabetoj. El 14 milionoj da sciencistoj kaj inĝenieroj en la mondo la landoj en Azio disponas pri 1 miliono, Latin-Ameriko pri ĉ. 200 000, kaj Afriko pri 70 000 sciencistoj.

En Afriko la intelektularo estas tre malmultnombra. La nombro de personoj, posedantaj altgradan klerecon, varias de 2,4% en pli bone disvolviĝintaj landoj (ekz. Gano, Niĝerio) ĝis 1,2% en la postrestintaj Siera-Leono, Ĉadio, Lesoto k.a. En la momento de sendependiĝo (1960) en la landoj de Tropika Afriko estis nur 8 universitatoj, kie studis 4 325 studentoj. Post 10 jaroj jam estis 44 universitatoj. Tamen la altlernejoj en Afriko estas adaptitaj malbone al la nuntempaj evolukondiĉoj. Iliajn strukturon, instrukursojn, oni transprenis de la klerigsistemoj de la metropoloj. Tiel la brita sistemo ripetiĝis en universitataj kolegioj en Akro (Gano), Ibadan (Niĝerio) kaj Makarere (Ugando). Du universitatoj en Zairio utiligas instruprogramojn de belgaj universitatoj. La universitato en Dakaro (Senegalio) havas fortan influon de la franca klerigsistemo. La preparo de landaj fakuloj en universitatoj kaj altlernejoj ne spegulas la realajn bezonojn pri disvolviĝo de la nacia ekonomio. Laŭ informoj de Unesko, malpli ol unu triono el la studentoj specialiĝas en la sfero de naturaj, teknikaj kaj agrikulturaj sciencoj.

Unu el la gravegaj rezultoj de la nacia liberiĝo estas la konsekvenca registara politiko pri estigo de demokratia kaj vastigita klerigsistemo. En la jarcento de sciencteknika revolucio, la instruado estas grava kondiĉo por la socia kaj ekonomia progreso. Oni devas strebi al teknologia sendependeco en la industria evoluo. Sed en la landoj de Latin-Ameriko, el 10 000 enloĝantoj estas 69 sciencistoj kaj inĝenieroj, en Azio 22, en Afriko 6, kontraŭ 112 en la disvolvitaj industriaj landoj. La malalta scienca potencialo kaj la analfabeteco de la loĝantaro kreas ankoraŭ pli grandan dependecon de evolulandoj je importo de teknologio, kaŭzante pliajn malhelpaĵojn en la batalo por ekonomie memstara evoluo. Tial jam en la unuaj sendependecaj jaroj la klerigo fariĝis objekto de kunplanado inter naciaj registaroj kaj internaciaj organizaĵoj. La regionaj konferencoj de ministroj







Foto: Unesko/Dominique Roger

Ekipaĵo provizita de UNICEF transformis la sciencan laboratorion en ĉi tiu alt-lernejo apud Katmandu, Nepalo















**En aŭgusto ĉi-jare nia oficisto pri la eksteraj rilatoj de TEJO, Ian Tarrant, finis sia**
**kun Ugando. Komence de decembro li sendis al *Kontakto* faskon da freŝaj fotoj p**
**ĉi tiun kontinenton de ekstere pli frue ol Ian! Oni rimarku ne nur la invadintan va**
**zentas de supre: funkciantan butikon, butikon apenaŭ funkciantan "ĉar la posedan**
**du fotoj pri la regosistemo. La pli supra prezentas anglalingvan tekston pri histori**
**Pli sube, vilaĝanoj tre pacience atendas horojn en vicoj por voĉdoni. Malgraŭ tio, k**


pri klerigo kaj ekonomia planado komence de la 70-aj jaroj projektis altiri ĝis 1980 al elementa lernejo 100% el la infanoj en Afriko kaj Latin-Ameriko, 95% en la arabaj landoj kaj 90% en Azio.

Nuntempe en la plimulto el la liberiĝintaj landoj elstaris tendenco al 'ekskoloniigo' de la instruado. Gravan progreson oni atingis en la sfero de mez- kaj alt-grada instruado. Landoj, kiuj antaŭ jaroj ne havis sciencajn fakulojn, nun disponas pri sciencesploraj centroj kaj laboratorioj. Por la bezonoj de la klerigo iuj triamondaj ŝtatoj rezervas 30-40% el ĉiuj buĝetaj elspezoj. Kaj tamen sentiĝas akuta neceso pri monrimedoj por la instru-evoluo. La instruada reformo en pluraj ŝtatoj okupas gravan lokon. Oni celas krei unuecan senpagan sistemon kun produktada orientiĝo. Jam en la dua kvinjara evoluplano (1969-1974) de Tanzanio oni antaŭvidis kune kun la elementa instruado (eble en 1989 ĉiu infano lernos) vastigi la mezan, teknikan kaj universitatan instruadojn konforme al la bezonoj de la landa ekonomio. Popola Respubliko Kongio okupas en Afriko elstaran lokon rilate disvastigon de la elementa klerigo: 90-95% el la infanoj en la koncerna aĝo lernas. Por sukcesoj en la klerigsfero PR Kongio ricevis la internacian premion de Unesko 'N.K. Krupskaja'. La evoluo de teknika instruado efektiviĝas per profesiaj preparcentroj, teknikaj lernejoj kaj liceoj. La trijara programo (1975-1977) pri nacia klerigo antaŭvidis plibonigon de la material-teknika bazo kaj plimultigon de la instruistoj.


La atingitaj sukcesoj en la klerigsfero ne signifas, ke la triamondaj landoj solvis la problemon pri la analfabeteco kaj altiro de la infanoj al lerneja instruado. La necesaj monrimedoj en multaj ŝtatoj mankas. La obstakloj kaj kontraŭdiroj de la soci-ekonomia evoluo bremsas neeviteble la kulturan progreson. ■











deĵorperiodon unujaran. En septembro li akceptis instruistan postenon ĉe la Alt-lernejo en Bukhalalire, kiu situas en Kenjo, proksime al la landlimo sia nova medio. Plej dekstre kaj desupre aperas kvinfota eniro en tiun mondon. Jam en la tria bildo vidiĝas eble la plej kliŝa spuro, ke aliaj jam enpaŝis on — rimarku ankaŭ la invadintan lingvon. La enkonduko finiĝas per vidoj de la hotelo kaj poŝtoficejo/biciklo-riparejo. La maldekstra trifota strio pre-o jam sufiĉe riĉas", kaj panbakejon kun brulligno preta. La plej granda foto prezentas rigardon de la bazaro en Bukhalalire. Supre iom maldekstre aperas sur iom malbonstata nigra tabulo en la lernejo: "Nia regosistemo estas demokrata. Ĝi helpas nin kaj ĉiu havas liberecon. Ekzistas pluraj ministerioj...". j pluvo, proksimume 70% de la voĉdonrajtaj voĉdonis. La voĉdontago estas nacia ferio.

# Israelo kaj la Tria Mondo — kunlaboro kaj rompo

de Amri Wandel, Israelo



Oni povas dividi la rilatojn inter Israelo kaj la ŝtatoj de la 'Tria Mondo' en du apartajn epokojn. La unua estas la jaroj 1958-1967 — la komenco kaj florado de komerca, teknika kaj agrikultura kunlaboro, speciale kun la afrikaj landoj. La duan epokon — de post la sestaga milito de 1967, kaj fakte ĝis nun — karakterizas la ŝrumpado kaj la politika erodo de tiuj rilatoj, ĝis la rompo de diplomatiaj rilatoj kun granda parto de la Tria Mondo, post la milito de 1973.

La unuaj kontaktoj inter Israelo kaj la Tria Mondo okazis en 1953, kaj en 1954 komenciĝis teknika helpo al Birmo. Tamen, la kunlaboro kaj la komercaj rilatoj vaste evoluis nur post la milito de 1956, kiam estis malfermita la ĝis tiam blokita marvojo de Eilat — la suda haveno de Israelo — al la Hinda Oceano, kaj sekve al Orienta Afriko kaj Azio. La unuaj afrikaj ŝtatoj kiuj ricevis teknikan helpon de Israelo estis Liberio kaj Ganao, en 1958. Multaj aliaj sekvis. En la israela ekstera ministerio estis fondita la Departemento por Internacia Kunlaboro, kiu en 1958 komencis la 'Programon por Kunlaboro kun la Evoluantaj Popoloj', kun tri ĉefaj taskoj:

1. Organizi kursojn por studentoj kaj ekspertoj senditaj de sia ŝtato por lerni kaj spertiĝi en Israelo;
2. Sendi israelajn ekspertojn al gvidaj taskoj en aliaj landoj;
3. Fondi centrojn por profesia specialiĝo.

Du el la plej konataj institutoj estis la Afrika-Azia Instituto de la Histadrut (la laborista organizo de Israelo) kaj la Karmel-Monta Centro por Komunumaj Servoj. La Programo de Kunlaboro traktis la kampojn de agrikulturo, teknologio, junularaj organizoj, administrado, konstruado kaj industrio, socia laboro, kooperativoj, komerco kaj financo, medicino kaj saneco, edukado kaj aliaj.

| | Israelaj ekspertoj eksterlande | | | Fremdaj specialiĝantoj en Israelo | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| *Regiono/Jaro* | 1958 | 1964 | 1968 | 1958 | 1964 | 1968 |
| Afriko | 25 | 528 | 273 | 59 | 1363 | 469 |
| Azio | 15 | 39 | 53 | 71 | 224 | 300 |
| Latinameriko | ---- | 73 | 91 | 2 | 399 | 255 |
| Mediteraneo | ---- | 58 | 44 | 5 | 428 | 157 |
| *Sume* | 40 | 698 | 490 | 137 | 2446 | 1163 |

La israela helpo al la evolulandoj havis du ĉefajn aspektojn. Israelaj ekspertoj estis senditaj al la koncernaj ŝtatoj kun difinitaj taskoj: trejni, instrui kaj montri al la lokaj gvidantoj kaj enloĝantoj la sperton kaj la metodojn evoluintajn en Israelo dum la similaj paŝoj de evoluo kiujn trapasis Israelo. Due, studentoj kaj specialiĝantoj estis senditaj de sia registaro por studi la bezonatajn fakojn en Israelo. Dum la periodo 1958-1966, ĉirkaŭ 9 000 personoj de pli ol 90 evoluantaj landoj venis al Israelo por spertiĝi, studi kaj observi, kaj ĉirkaŭ 3 500 operacioj de helpo estis plenumitaj de israelaj ekspertoj en evolulandoj. Post 1958 la kunlaboro rapide kreskis, kiel eblas vidi en la tabelo. La plej granda parto de la kunlaboro estis kun la afrikaj landoj, sed simila kunlaboro evoluis ankaŭ kun Azio, Latinameriko kaj la Mediteranea regiono. Israelaj ekspertoj agadis en preskaŭ ĉiuj afrikaj ŝtatoj, escepte de la islamaj nordafrikaj ŝtatoj kaj Sudafriko. En Azio: en Irano, Cejlono, Nepalo, Birmo, Tajlando kaj la Filipinoj. En Latinameriko: ĉiuj ŝtatoj krom Urugvajo, Paragvajo kaj Gvajano; kaj en la Mediteranea regiono: Jugoslavio, Turkio, Cipro kaj Malto.

La apuda tabelo montras la skalon de la agado en tri epokoj: la komenco de la Programo (1958), ĝia kulmino (1964) kaj la jaro post la sestaga milito.

Kvankam Israelo havis proprajn ekonomiajn malfacilaĵojn, la financa helpo de Israelo en la afrika regiono en la jaroj 1960-1964 sumiĝis je 37 milionoj da usonaj dolaroj.

Kial Israelo, al kiu ne mankis internaj problemoj pro la rapida evoluo kaj la amasa enmigrado, elspezis tiom da energio kaj mono ekstere? Estas esence tri kialoj:

1. *Politika* — de sia fondiĝo Israelo estis ĉirkaŭita de malamikaj ŝtatoj, kiuj kontraŭis ĉiujn rilatojn kaj ekonomie bojkotis ĝin. Israelo do serĉis amikojn kaj provis kunlabori kun la evoluantaj landoj, kiuj havis similajn problemojn.
2. *Ekonomia* — Israelo ligis komercajn rilatojn kun multaj el tiuj landoj; speciale intensajn kun Kenjo, Etiopio kaj Ugando.
3. *Humaneca* — pro la sorto de subpremado kaj lukto por sendependeco, kiujn travivis la juda popolo, Israelo komprenis kaj simpatiis la similan sorton de multaj evoluantaj popoloj. Bone esprimis tion la prezidento de Eburbordo, Hoophouet-Boigny, kiu diris en 1966: "Mi devas emfazi, ne kun pasio sed solene kaj sincere, la ligojn kiuj unuigas ĉiujn afrik-

anojn kun la juda popolo. Dum jarcentoj tiu popolo spertis ĉiujn formojn de miskompreno, subpremado, malamo kaj sufero...".

Kial la afrikaj landoj petis teknikan helpon de Israelo? La plej elstaraj kialoj ŝajnas esti:

1. Israelo estas malgranda lando, do la kunlaborantaj landoj ne timis koloniismon. Israelo ankaŭ ne ligis politikajn kondiĉojn al sia helpo, kiel faris la grandaj potencoj.
2. Israelo estas mem juna ŝtato, evoluanta tre rapide, kaj tial estas pli bona ekzemplo ol la jam evoluintaj ŝtatoj.
3. Similas la sorto de subpremado kaj dekoloniiĝo kiun trapasis la juda popolo al tiu de la afrikaj popoloj.
4. La kooperativaj agrikulturaj sociaj formoj evoluintaj en Israelo — la kibucoj kaj moŝavoj — interesis la evoluantajn landojn. Multaj el la israelaj ekspertoj venis de tiuj agrikulturaj loĝlokoj.
5. En Israelo kunfandiĝis enmigrantoj de la tuta mondo, kaj la afrikaj landoj, kiuj staris antaŭ la problemo kunfandi siajn tribojn, povis lerni de la israela sperto.
6. La afrikaj ŝtatoj estis impresitaj de la rolo kiun plenumis la israela armeo en la organizo de socia vivo.

Dum la sestaga milito de 1967 kaj tuj poste, la Tria Mondo ne estis preta interveni en la konflikton. Multaj el tiuj ŝtatoj havis bonajn rilatojn kun Israelo, kaj ricevis de ĝi teknikan helpon. La plimulto de ili preferis kompletan solvon por la mezorienta konflikto, al limigita aranĝo aŭ interveno por unu el la flankoj, kiel montris la voĉdono por la UN-rezolucio 242. En la postaj jaroj Egiptio kaj la aliaj islamaj ŝtatoj sukcesis pli kaj pli levi la problemojn de la konflikto — kiuj estis la palestinanoj kaj la okupataj teritorioj — en internaciaj forumoj, kiel la Organizo de Afrika Unueco (OAU), la kunvenoj de la nealiancitaj ŝtatoj kaj Unuiĝintaj Nacioj. Speciale en Afriko, sub la premo de Egiptio kaj la nordafrikaj islamaj ŝtatoj, la rezolucioj de OAU pli kaj pli akre kondamnis Israelon, kaj multaj afrikaj ŝtatoj limigis siajn kontaktojn kun Israelo. La kulmino de tiu procedo alvenis dum la milito de 1973, kiam preskaŭ ĉiuj afrikaj ŝtatoj rompis la diplomatiajn rilatojn kun Israelo, laŭ la voko de OAU-rezolucio.

Tamen, multaj ne-afrikaj ŝtatoj de la Tria Mondo konservis la diplomatiajn rilatojn kun Israelo, kaj pluraj el la afrikaj ŝtatoj neformale daŭrigas la kunlaboron kaj kontaktojn kun Israelo. Multaj el tiuj ŝtatoj rigardas la rompon de diplomatiaj rilatoj kiel provizoran. Ĉe kelkaj tiu paŝo venis pro interna aŭ ekstera premo. La vizito de prezidento Saadat en Jerusalemo je 20-11-1977, kiun sekvis rektaj negocoj inter Israelo kaj Egiptio, estis akceptita kun kontento de multaj el la triamondaj ŝtatoj. Kvankam la egipta-israela packontrakto ĝis nun ne kaŭzis konkretan movon en la direkto al reestablo de diplomatiaj rilatoj, oni rajtas atendi plibonigon de la rilatoj kun la Tria Mondo, se okazos signifa evoluo en la direkto al ĝenerala solvo de la mezorienta konflikto. ▪

**BIBLIOGRAFIO**

1. Israel and the developing countries, Leopold Laufer, New York, 1967
2. Israeli Technical Assistance to African Countries, J.J. Kanarek, Geneva-African Institute, 1969
3. The 'Third World' dimension of the Arab-Israeli Conflict, O. Sofer, *International Problems,* 1978

---

# La indianoj kiel ni ne konas ilin



de

**Herman Deceuninck,**

**Flandrio**

La lernolibroj pri historio emas priskribi la multajn militojn de centoj da indianaj triboj, la sennombrajn ribelojn de la 'Ruĝa Viro' kontraŭ la blankaj eksterm-klopodoj kiel sporadajn, sed pli realece estas paroli pri 450 jaroj da daŭra ribelo kaj lukto kontraŭ blanka superregado.

## La problemoj de la indianoj

La plej profunda atenco al la vivo de la indianoj estis ke oni difektis la tradician ekzistobazon de la indiano: nome la naturon. Tiel ili perdis la tradiciajn vivrimedojn kaj tio kondukis ilin al alkoholismo, prostituado kaj krimeco.

Sur la rezervejoj de iuj triboj oni trovas valorajn krudmaterialojn, kiel ekzemple uranion, oron, nafton aŭ lignon. Tiukaze homaj rajtoj de indianoj estas taksataj malpli gravaj ol la monaj interesoj de okcidentaj multnaciaj entreprenoj, kelkloke subtenataj de diktatora militista reĝimo. Indianoj estas rigardataj de ili kiel 'sovaĝuloj', kiuj nur bremsas aŭ obstaklas la 'progreson'.

La indianaj triboj devige devas forlasi sian malnovan vivmanieron kaj adapti sin al la okcidenta socia sistemo. Indianoj kiuj forlasas sian vilaĝon por iri al urbo kie ili serĉas laboron, rapide transprenas la vivstilon de la urbo. Ili alvenas en vestaĵoj indianaj, sed en mallonga tempo ili forigas ilin por alpreni vestaĵojn de blankuloj. Ankaŭ iliaj infanoj iom post iom forgesas siajn indianajn lingvon, kanzonojn, nutraĵon kaj kutimojn. Grandegan problemon alfrontas indiano alveninta kun sia familio en la urbo kiam li klopodas serĉi domon. Plejofte tamen familianoj kaj amikoj intertempe helpas pri nutraĵo kaj loĝado. La tradicia gastamo plu ekzistas ankaŭ en la urbo. Sed longe daŭras antaŭ ol oni trovas bonan loĝejon. Tiu ĉi estas multekosta kaj malofta. Krome blankuloj ne volonte ludonas al indianoj.

La indianoj multe suferis pro la konkero de ilia tero. La kaŭzoj ĉiam estas: sklaveco, teroro, infektaj malsanoj kaj kulturperdo. Kontraŭ okcidentaj malsanoj kiel morbilo kaj gripo la indianoj ne estis imunaj, ĉar tiuj ĉi ne ekzistis sur la okcidenta duonsfero. La veno de unu blankulo kun malvarmumo en indianan vilaĝon sufiĉis por kaŭzi

gripepidemion. La blankuloj ofte eluzis tiun ĉi neimunecon kontraŭ malsanoj por ekstermi la indianojn, eĉ nuntempe. Registarprogramoj por nasklimigo estas nun ofte plenumataj sen iu ajn interkonsento kun la indianoj. En ekz. Brazilo kaj Bolivio, indianaj patrinoj konstatas ke ili ne plu povas naski infanojn post vizito al kuracisto. Tiu ĉi deviga steriligo estas rigardata de multaj indianoj kiel nova maniero por ekstermi ilin kiel popolon.

### Diskriminacio kontraŭ la 'ruĝaj'

Ne nur nigruloj sed ankaŭ la t.n. ruĝaj kapoj apartenas al la kompatinda homgrupo kies nura peko estas naskiĝi



kiel alipigmentuloj. Tio ofte sufiĉas por esti viktimo de diskriminacio. Kelkaj ekzemploj ilustras tion. Indianoj estas akre diskriminaciataj en la laboro. Laŭ la antaŭjuĝoj, ĉiuj indianoj estas maldiligentaj, nefidindaj kaj kutime ebriaj. Indianaj knabinoj ne estas akceptataj kiel vendistinoj en vendejoj, ĉar la direkcio opinias ke la klientoj tiam forrestos. La laboro kiun ili tamen povas trovi estas nur provizora. Aldonindas ĉi tie ke indianoj ofte ne ricevis sufiĉan instruadon. Krome, multaj havas problemojn pri la lingvo. Tio donas kune kun ĉiuj aliaj problemoj multe da nesekureco. La plimulto de la lernejoj en la urbegoj havas lernantojn de pluraj rasoj.

Tamen ekzistas diskriminacio de indianaj infanoj. La edukado ne multe signifas por multaj indianaj infanoj, ĉar ili ricevis indianan edukadon. Tial multaj ne finas la lernejon. Feliĉe nun ĉiam pli kaj pli da infanoj havas la eblecon iri al indianaj lernejoj, la t.n. pluvivlernejoj. Tie oni instruas la indianajn kulturon, lingvon kaj valorsistemon bazitan sur dividado de ĉio unu kun la alia.

### La kredo ne lasas sin altrudi

Dum jarcentoj la blankuloj klopodis eduki la indianojn kiel blankulojn. Sen multa sukceso. Ĉio komenciĝis per la konvertofervoro de la misiistoj. Komence tamen ekzistis eĉ dubo ĉu la indianoj estas homoj, sed poste venis aktiva konvertopolitiko. Paganaj religioj estis tute malpermesitaj. La plej malgranda puno al malobservo de tio estis eksproprietigo de la koncerna persono. Ne por nenio la eklezio iĝis en mallonga tempo la plej granda terposedanto de Sud-Ameriko. La indianoj ankoraŭ povis kompreni ke la hispanoj volas forŝteli iliajn posedaĵojn, sed ke ili volas altrudi al ili ankaŭ alian kredon — tion ili neniam komprenis. La blankuloj ne sciis disigi la instruon pri Kristo de la edukado pri la eŭropa vivmaniero. Precipe misiistoj klopodis eduki la indianojn al obeemaj civitanoj.

Fondiĝis lernejoj kie indianaj infanoj lernis legi (en la Biblio), skribi kaj kalkuli kaj kie la centraj valoroj de la eŭropa vivmaniero estis transdonitaj. La knaboj devis fendi lignon, semi kaj rikolti. La knabinoj lernis kudri, lavi kaj kuiri. Ĉi tia edukado neniel kongruis kun la enlanda vivmaniero tiel ke multaj gepatroj gardis siajn infanojn hejme. Poste oni serĉis alian vojon kaj altiris la infanojn al loĝlernejoj malproksime de iliaj gepatroj. Tie ili devis iri al banejo por sin lavi, ilia hararo estis tondita kaj ili ricevis okcidentajn uniformajn vestaĵojn. Oni donis al ili kristanajn nomojn kaj ili ne rajtis plu paroli sian propran lingvon. Malobeon de ĉio ĉi sekvis korpopunoj. La infanoj estis tute fremdaj al sia familio kiam ili revenis hejmen. Tiuj ĉi loĝlernejoj kostis monon, kaj tio venis de blankaj eklezioj. Kelkfoje, kaze de deficito, la infanoj devis perlabori monon aŭ servis kiel seksa ludilaro. Tio ĉi plu okazas nuntempe i.a. ĉe la aĉe-indianoj en Paragvajo.

La misio klopodis ankaŭ loĝigi la indianojn en fiksaj loĝlokoj kaj instrui al ili agrikulturon, individualismon kaj blankulan demokration. Sed la agrikulturo malmulte interesis la nomadajn indianojn. Individualismo kontraŭis la enlandajn formojn de donacemo, gastamo kaj reciproka dependeco. Blankula demokratio estis samsignifa al la rajto de la plej forta, do ne de la indianoj. Jam konvertiĝintaj indianoj estis akceptitaj nek de aliaj indianoj nek de la blankuloj. La konvertemo havis kelkfoje aliajn kialojn ol religiajn, ĉar ekzemple ekzistis konkurenco inter katolikaj kaj protestantaj misioj pri kiu rajtas konverti kiun tribon. En Sud-Ameriko la misio ludas ankoraŭ gravan rolon en la instruado al aŭtoĥtonaj popoloj. En Nord-Ameriko, la ŝtato transprenis iom post iom la instruadon ekde 1880.

Misiistoj faris ankaŭ bonan laboron. Multaj ekleziuloj klopodas protekti la indianojn kontraŭ ekspluatado far blankaj komercistoj kaj kamparanoj. Krome la medicinaj provizoj ĉe la indianaj komunumoj estas hodiaŭ ofte pli bone administrataj sub misio ol sub la koncerna fako de la registaro.

### Konkludoj

La problemoj de la indianoj ĉie kaj ĉiam estas: la perdo de tero, la manko de la ebleco decidi pri sia propra sorto, la ekonomie dependa pozicio, la malbona sanstato, diskriminacio, paternalismo de la blankuloj kaj kultura subpremado. La ĉefkaŭzo de subpremado kaj detruo de la indianaj kulturoj kaj popoloj troviĝas en la emo de la blankuloj al riĉeco, pravigita per ilia etnocentrismo.* La problemo de la indianoj estas la problemo de la hegemonio de blankuloj super indianoj kaj, pli larĝe, la problemo de superregado de la okcidenta socio super aliaj socioj. Ĉie ni vidas la samajn esprimformojn de tiu superregado. En ĉiu situacio la graveco de tiuj ĉi esprimformoj diferencas. Kiam la superrega povo konsistas el religia komunumo tiam la akcento kuŝas sur kultura subpremado. Kontraŭe, kiam komercistoj estas la estroj tiam la ekonomia aspekto pli gravas. Kiam la superrega socio estas ne-kapitalista, tiam la akcento troviĝas ankaŭ pli sur la kultura kampo. ▪

**Fontoj:** Diversaj broŝuroj pri indianaj problemoj, eldonitaj de la Roterdama Artfondaĵo.

* *Etnocentrismo:* La ideo, ke oni rajtas juĝi aliajn kulturojn laŭ kriterioj de sia propra kulturo. Kredi ke la propra kulturo estas la plej bona ja esencas por la konservado de ĉiu kulturo (ankaŭ lingvo), sed, aliflanke, tio povas minaci la bonfarton de aliaj popoloj, se ĝi iĝas la bazo por altrudi proprajn kriteriojn fronte al aliaj kulturoj.

# La Tria kaj la Verda Mondoj

de Michael Lennartz, Germana DR

La eksploda kresko de la Esperanto-movado en Irano denove direktis la atenton de la esperantista publiko al la Tria Mondo. Ankaŭ la reaktiviĝo de la ĉina movado donis stimulan impulson. Antaŭ nemultaj monatoj mi legis pri la laŭdinda agado E3 en la UEA-revuo *Esperanto* (n-ro 7/8 de 1979). Tamen: Kio estas la Tria Mondo por ni? Ĉu granda cisterno, en kiu atendas armeo de esperantistontoj? Ĉu landaro kun lingvaj problemoj, por kiu Esperanto estas paradiza donaco? Leganto de la menciitaj artikoloj (escepte de E3) certe respondus jese, sed la koncernatoj mem, la triamondanoj, eble ne konscias tiel.

La landoj de la Tria Mondo suferas multajn problemojn. Ni komencu ĉe la hobio de ĉiuj esperantistoj: la lingvaj problemoj. En la tuta mondo nur dekono el la 2500 - 3000 lingvoj havas propran skribon. Ĉirkaŭ unu miliardo da homoj ne scipovas legadon nek skribadon. Esperanto solvas neniun el tiuj problemoj. La okupiĝo pri esperantologio povus iom helpi trovi solvojn. Sed tiuj landoj ja ne havas nur lingvajn problemojn. Tiuj eĉ estas relative malgravaj kompare kun la ekonomiaj kaj socialaj malfacilaĵoj.

En Nikaragvo ĵus okazis revolucio. La urboj estas detruitaj; homoj nekredeble suferadas. Ĉu oni tie havas emon kaj eblecon esperantumi? En Kampuĉeo mortis proksimume tri milionoj da homoj (preskaŭ duono el la loĝantaro) Okcent mil fuĝis el Vjetnamio. Ĉu ili lernu Esperanton? En Irano revoluciaj fortoj detronigis la ŝahon. Kion demandas la esperantistoj? Nu, ili scivolas, ĉu la novaj registoj permesas al la juna esperantista movado pluaktivi.

Mi listigis tiujn tri ekzemplojn por montri ke la esperantistaj rondoj ne nur vidu kaj komprenu la lingvajn problemojn de la Tria Mondo. Se ni, la esperantistoj, postulas atenton pri nia fako fare de kompetentuloj en la evoluaj landoj, tiam ni mem devas antaŭe percepti la tuton de la komplikaj kaj ampleksaj problemoj en tiuj landoj. Alie ili vere estas alia mondo kvazaŭ sur alia stelo.

En sufiĉe multaj landoj agadas naciliberigaj taĉmentoj por kiuj politikaj, ekonomiaj kaj militaj bataloj estas plej prioritataj. Aliaj ŝtatoj spertas oftan ŝanĝon de la registaro, alternas demokratiuloj, militistoj, reĝoj... Pro la malstabileco de tiaj reĝimoj, la neceso savi la propran vivon kaj iujn havaĵojn, plej ofte eĉ ne permesas penson, ĉu la najbaro aŭ nekonato, al kiu oni fuĝas, parolas samlingve aŭ Esperanton aŭ krokodile. Pri ni 'riĉaj' esperantistoj la litergrupoj 'malsato, manko de klero, manko de medicinaj instalaĵoj' estas nocioj. Sed ĉu ni vere konscie dum nia esperantista (kaj ne nur tia) laboro konsideras tiujn problemojn kiel gravajn? Ni, kaj tio ne signifas ĉiun unuopan, sed la organizojn, la verkantojn kaj prelegantojn pri la Tria Mondo, do ni pli bone konu kaj studu la Unesko-programojn (ja ni estu seriozaj partneroj!), provu malkovri kie troviĝas kroĉpunkto por lingvopolitiko. Ni konu la lingvopolitikon de la Tria Mondo; ĝi ĝenerale diversas de lando al lando, kaj poste ni proponu niajn spertojn (iomete ankaŭ nian karan verdan lingvon) laŭ la realaj bezonoj, kun la ĝusta socipolitika envicigo de la problemo. ▪


# HEROLDO
## DE ESPERANTO

**LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO**
**De 58 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo**

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Literatura kaj scienca suplementoj

Jarabono: 440 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (30,00 guldenoj; por Nederlando 31,20 gld.)

**Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo**
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

TRIAMONDA
# MOZAIKO
Kontribuis Ĝim Kuŝino (Jugoslavio) kaj Loes Demmendaal (Nederlando)

### Bebonutrado kaj la lakto-industrio

Kiel virinoj en la Tria Mondo nutru siajn bebojn? Pri ĉi tiu temo okazis konferneco de MOS kaj UNICEF en Ĝenevo. La reprezentantoj de la okcidenta laktoindustrio anoncis, ke ili intencas kontraŭstari ĉiujn limigojn pri eksporto kaj propagando de laktopulvoro, kiuj estus pli drastaj ol tiuj, kiujn ili jam subskribe akceptis.

La agadgrupoj venis kun novaj pruvoj pri ne allasindaj reklammetodoj uzataj (laŭ la industrio, temas pri malnovaj reklamiloj) kaj kun pruvo, ke mamnutrado fariĝas ankoraŭ malpli ofte praktikata. La sanaŭtoritatoj pli kaj pli ofte konstatas sekvojn de nehigiena kaj malbona uzo de laktopulvoro. MOS-esploro en la kamparo de Ĉilio trovis, ke trioble tiom da beboj mortis, kiuj estis nutritaj per laktopulvoro, ol mamnutritaj. Nur 20% de la popolo tie havas aliron al higiena akvo.

Reklamoj ne rajtas supozigi, ke lakotpulvoro estas pli bona ol mamnutrado. Efektive, okazas nun malpli da videbla reklamado; la industrio turnas sin nun rekte al la sanservoj. En Azio kaj Afriko laktopulvoraj kompanioj dungas eksflegistinojn por doni "objektivajn" konsilojn. Senpagaj provekzempleroj kaj reklam-libretoj troviĝas en multaj malsanulejetoj. Kuracisto kiel dankon ofte ricevas fridujon aŭ aliajn urĝe bezonatajn instrumentojn.

Laŭ industriaj reprezentantoj, virinoj en la Tria Mondo havas la rajton elekti eksterdoman laboron kaj sekve elekti pulvoran lakton por siaj infanoj. Do, la industrio subtenas la emancipiĝon de la triamonda virino! (Trad. LD) ■

# Regado en Afriko

de Elisabeth Schwarzer, FR Germanio

Amaso da sendependaj ŝtatoj en Afriko kreiĝis ekde 1960. Koloniismaj ŝtatoj Britio kaj Francio permesis al la koloniaj teritorioj eniri propran suverenecon kaj garantiis sian protekton. Praktike rezultis daŭrigado de la intensaj ekonomiaj interrilatoj, kaj same estis sur kampoj de edukado, sano, kulturo kaj politika regado.

Relative profunde detruiĝis tradiciaj strukturoj en afrikaj socioj ekde la komenco de la koloniisma periodo. Ekzistas du gravaj tipoj de socia organizado en tradicia Afriko:

**1) Senŝtataj socioj:** Iliaj membroj estas samrajtaj. Ne ekzistas centra aŭtoritato. Administracion tiuj segmentaj socioj ne konas. Ili povas ampleksi ĝis proksimume unu milionon da homoj, eventuale loĝantaj en pli ol unu teritorio.

**2) Primitivaj ŝtatoj:** La tradiciaj socioj havas centran aŭtoritaton, tribestron, kiun elektas la honoruloj. Pluraj kulturaj unuoj kaj teritorioj povas aparteni al unu tia socio. Aliaj personoj plenumas la oficialajn decidojn kaj atentas ke oni sekvu ilin. Cele al la vivtenado de la estro kaj la administrantoj la tribanoj devas pagi impostojn.
La tribestro ne havas senliman potencon, ĉar estas pluraj sociaj grupoj kiuj atentas pri zorga regado. Li elektiĝas pro komuna decido pri lia kapablo kaj se li fuŝas, oni forigas lin aŭtomate. La tribanoj ne rigardas la estron reprezentanto de ŝtata potenco rilate al kiu oni estas senhelpa. Kontraŭe, li prizorgas la komunajn interesojn kaj tiel servas la subulojn. La estro disponas pri kolektiva potenco. La interrilatoj kaj kontaktoj estas reciprokaj. La bazo de la origina afrika socio ne estas la kern-familio sed la grand-familio. Ĝiaj membroj havas unu komunan praulon.

La koloniismaj ŝtatoj postlasis registarojn laŭ propra konveno en la momento de la ŝtata sendependiĝo. La antaŭjuĝo pri nekapablo de nigruloj aranĝi propran politikon daŭre regis en Eŭropo. Efektive, la eŭropaj ŝtatoj mem, celante la propran profiton, malhelpis la edukiĝon al memstareco necesan por la posta bona funkciado de sendependa ŝtato. Alĝerio estas escepto, kiu mem liberigis sin en 1962 per revolucio kaj konsekvence orientiĝis al memstareco.
La ĉefa rego-sistemo en afrikaj ŝtatoj komence estis unupartia, kaj tio plurloke konserviĝis. Ankaŭ armeaj revoluciprovoj en plurpartiaj ŝtatoj signifas ion ne komplete eksterordinaran. La unusolaj partioj aŭ antaŭe direktis kontraŭkoloniisman lukton aŭ forigis la konkurencantojn post sukcesaj elektoj aŭ havas en siaj ĉefaj pozicioj armeanojn. La modelon pri demokratio laŭ okcidenteŭropa idealo la koloniismaj ŝtatoj donis al la juna Afriko. Sekve ili sufiĉe malfavore surpriziĝis pri la unusolaj partioj, kiujn ili opiniis reveno al formo de barbarismo.

Tamen unusolaj regantoj sur la bazo de ĝenerala konsento estas tute tradiciaj. Post la periodo sub la rego de la eŭropaj ŝtatoj, afrikanoj rapide kaj grandskale reaplikis sian politikan sistemon. Multe pli grandan problemon formis senŝtataj socioj kies bazojn jam plene detruis la koloniismo. Al ili oni starigis aŭtoritatojn kaj partoprenigis ilin en la administracio. Plej mirigaj al eŭropanoj certe estis la anarkiaj cirkonstancoj en pasinteco.

Nur en Alĝerio kaj Etiopio la armeoj havas kontraŭkoloniisman kaj propran tradicion. Ĉiuj aliaj estas relikvoj de koloniismo. Ilin estris senescepte eŭropanoj, kiuj strebis apliki la ŝablonojn de la eŭropa centro. Tio daŭris en Niĝerio ĝis 1965. En la brita kolonia armeo, koncepto pri nepolitikeco de gvidaj armeanoj regis aparte longe.

La limoj de nunaj afrikaj ŝtatoj estas sufiĉe regulaj, ĉar pli-malpli hejme sur la mapo la eŭropaj koloniistoj komencis dividi Afrikon. Kaj tiujn formojn nun memkompreneble afrikaj ŝtatoj same devas sekvi. Nur marĝene oni atentis etnajn kaj aliajn unuojn. Sekve, ofta konflikto ekestis inter diversaj etnoj en la sama ŝtato, aŭ estis streboj unuigi unu etnon loĝantan en du aŭ tri novaj ŝtatoj. Tian agadon ĉefe malhelpis la junaj armeoj.


Armeaj sukcesoj kredigis la armeon pri la propra valoro kaj signifo por la ŝtato entute. Aliflanke la ŝtatestroj ne aparte flegis ĝin, kaj la ĉefa intereso sur eduka kampo estis pliampleksigo de la relative prestiĝa laboro en administracio kaj ne en industrio kaj agrikulturo.

Revoluciprovoj komenciĝis en 1965 kaj populariĝis. Ekzistas ankaŭ laŭdiraj revoluciaj ŝtatoj, kiuj gardas konatajn (t.e. okcidenteŭropajn) principojn. Ili denove strebas al unueca, demokratia kaj ekonomie kreskanta nacia ŝtato. Montriĝis diversaj tendencoj: klopodoj resanigi la ekonomion, reiro al antaŭkoloniaj tradicioj, regado de unu partio, duflanka regado de la armeo kaj civilaj organoj. ■

## La trajtoj de subevoluinteco

Kiuj trajtoj karakterizas subevoluintan landon? En sia libro *La Tria Mondo kaj Riĉaj Landoj* (1972), la greka ekonomo A. Angelopoulos listigas la jenajn:

1. Alta proporcio de la laborantaro okupata en agrikulturo kaj uzanta primitivajn terkultivajn teknikojn;
2. Longdaŭra nutraĵa manko en larĝaj sektoroj de la loĝantaro;



3. Longdaŭraj senlaboreco kaj neadekvata dungiĝado;
4. Alta kreskorapido de la loĝantaro.
5. Mankohava socia substrukturo kaj malefika industriigo;
6. Malalta nivelo de sciencaj kaj teknologiaj scioj;
7. Malaltaj niveloj de ŝparado kaj investado, kaj limigita akumulado de kapitalo;
8. Nesufiĉa utiligo de naturaj rimedoj kaj mineralaj tavoloj;
9. Strukturaj malekvilibroj kaj ekonomia dualismo (t.e., la kunekzistado de modernaj kaj primitivaj ekonomisektoroj);
10. Troa dependo je eksterlandaj komercado kaj kapital-enfluo;
11. Malaltaj viv- kaj enspezniveloj.

(Sendis ĜK) ■

## Nova teo-propaganda centro

Dum kunveno en Bombay (Bombej), membroj de la Internacia Teo-Propaganda Asocio (ITPA) decidis starigi sian centran oficejon en Roterdamo. Ili tion decidis ĉar ĝi tie situas bone rilate al te-vendado kaj al bonaj internaciaj ligoj. La Ministro pri Evoluhelpo en Nederlando promesis al la centro financan kaj administran helpon en la unuaj jaroj.

Unuafoje tia propaganda centro estas starigita de **nur** evolulandoj. Aliaj urboj kiuj kandidatiĝis estis Nov-Jorko, Hamburgo kaj Londono. Kiel direktoron de la centro oni elektis la hindon Tarlok Singh Broca.

ITPA estas organizo de teo-produktantaj kaj eksportantaj landoj kiu fondiĝis en februaro ĉi-jare. Ĝi celas pliigi la uzon de teo i.a. per kunordigo de reklamagado kaj starigo de bonaj rilatoj kun teo-komercistoj en la teo-konsumaj landoj. Ĝis nun aliĝis al ITPA Bangladeŝo, Hinda Unio, Indonezio, Kenjo, Malavio, Maŭricio, Srilanko, Tanzanio kaj Ugando.

(LD) ■

## Malsato en la mondo

Tra la homa historio milionoj da personoj mortis dum periodoj de malsatego. Nuntempe ankoraŭ milionoj pereas malrapide pro mankoj en la proteina kaj vitamina konsisto de manĝaĵoj, kaj pro sia sekva malforta rezistemo al malsanoj. Laŭ statistikaj taksoj, 30% ĝis 50% de la monda loĝantaro suferas pro **kvalitaj mankoj** en la nutraĵoj, kaj 10% ĝis 15% pro **nesufiĉaj kvantoj** de manĝaĵoj konsumataj. Laŭ statistikoj de Organizaĵo pri Nutraĵoj kaj Agrikulturo (FAO) de Unuiĝintaj Nacioj, la persona ĉiutaga konsumo de animala proteino estas po 66 gramoj en Norda Ameriko kaj nur po 8 gramoj en Malproksima Oriento. (Sendis ĜK) ■

## Nehaltigebla migro al la urboj

La nombro de urbo-loĝantoj en la mondo duobliĝis depost la kvindekaj jaroj kaj duobliĝos denove antaŭ la jaro 2000. Tio estas unu el la konkludoj el jarraporto de UN-fondaĵo pri demografiaj aferoj (UNFPA).

Laŭ la raporto, la fluo de homoj al la urboj estas la plej grava ŝanĝo en la monda demografio. Kvarono de la urba loĝantaro de la mondo jam nun loĝas en urbaj domaĉoj kaj malbonaj kvartaloj. Tio donas al evolulandoj enormajn problemojn. Unu el la sekvoj, kiuj minacas, estas nutraĵmanko.

En la kvindekaj jaroj loĝis en la evolulandoj 6 homoj en la kamparo kontraŭ unu en la urbo. Nun la proporcio estas 3 kontraŭ 1; en la fino de ĉi tiu jarcento ĝi estos 2 kontraŭ 1. UNFPA diras, ke la demando pri migrado al la urbo devos esti entreprenita en la planado de la evoluagado. Nuntempe 80% de la ŝtata mono en la evolulandoj estas elspezata favore al la urboj kaj urbigitaj regionoj. Jen unu el la kaŭzoj kial tiom da homoj migras de la kamparo al la urbo.

La konata hinda planadspertulo J.B. d'Souza opinias ke la kutima domarplanado ne sufiĉas por la amaso kiu venas al la urbo. Plej gravas en la planado por malriĉa popolo, ke la domoj estu pageblaj. Laŭ d'Souza, la domkonstruado en Hinda Unio ne estas sufiĉe adaptitaj al la malriĉa popolo. La lutarifoj de la domoj celitaj por la malriĉularo estas tiel altaj, ke nur la pli riĉaj personoj povas pagi ilin.

Laŭ d'Souza, multaj planistoj de enurbaj domoj ne kapablas aŭ hezitas atenti la fakton, ke multaj homoj en malbonaj kvartaloj antaŭ nelonge loĝis en vilaĝoj kaj ke ili — malgraŭ la fakto, ke ili loĝas en urbo — estas kamparanoj. Ili kunportas siajn lokajn kutimojn al la urbo. En vilaĝo oni same facile eniras la najbaran domon kiel la propran. Precipe virinoj faras multe da aferoj kune en komunaj lokoj eksterdome. Infanoj povas facile ludi dum parencoj aŭ najbaroj gardas ilin.

Planistoj pli ofte pensas pri la vivstilo, kiun spegulas la eŭropaj kaj nordamerikaj domoj. En evolulandoj oni prefere konstruu domojn kiuj permesas ankaŭ kamparan vivstilon. La vivospaco ne devas esti limigita per kvar muroj sed devas etendiĝi eksterdomen. La domoj estu konstruitaj en grupetoj ĉirkaŭ komuna placo, tiel ke restu spaco kaj eblecoj por socia kontakto, komuna dommastrumado kaj ludado.

Etaĝdomaroj estas do netaŭgaj. Estas larĝe miskomprenata fakto, ke manko de tero en urboj postulas konstruon de etaĝdomaroj. Etaĝdomaroj estas



kutime pli multekostaj ol normalaj domoj. Eĉ kiam la prezo de grundo estas alta, tio estas nur parteto de ĉiuj kostoj.

Fine opinias d'Souza, ke estas grave por homoj, ke la grundopeco sur kiu ili loĝas apartenu al ili. Nur tiam ili pretas ŝpari por plibonigi siajn domojn. Daŭra posedo estas bona rekomendo por plibonigo. Relative rapide oni rimarkas, ke la stanajn plakojn kaj la tukopecojn anstataŭas ŝtonaj muroj kaj tegmentoj el tegoloj.

(Trad. LD) ■

VIRINOJ KAJ VIROJ: Serio de Anna Brennan – SEPA KAJ KONKLUDA PARTO

# Por kio ni strebas?

Amiko lastatempe petis min nomi tri pravigojn por la klopodado de iuj virinoj ŝanĝi la socion. Laŭ li, ilia agado nur kreas malkontenton, kie ĝi ne antaŭe ekzistis. Mi respondis per la jenaj tri motivoj, kiujn mi volas pli detale diskuti en ĉi tiu artikolo: multaj virinoj estas jam malkontentaj pri la nuna socio; kvankam multaj virinoj opinias sin kontentaj pri sia rolo, tio efektive ne estas vera; multaj viroj agas laŭ nedezirinda maniero.

**Multaj virinoj jam estas malkontentaj.** Kiel ĉiu movado kun la celo ŝanĝi la socion, la virina movado konstante provas diskonigi siajn ideojn kaj influi la opiniojn de la publiko. Kaj tio kompreneble signifas, ke ĝi semas malkontenton. Certe ĝi povas montri sukcesojn sur la propaganda fronto, kvankam ĝiaj apogantoj argumentus, ke tamen restas multo farenda. Ordinaraj gazetoj sufiĉe ofte nuntempe portas informojn pri diversaj aspektoj de la egaliĝo de la seksoj, kaj eĉ konvenciaj virinaj revuoj pli ofte enhavas artikolojn pri temoj ekster la doma sfero. Rezulte, junaj paroj kutime atendas pli egalan rilaton ol iliaj gepatroj, kaj ĝenerale la ordinara homo pli konsciiĝas pri la tuta demando. Virinoj, kiuj verŝajne neniam antaŭe konsideris por si alian estontecon ol edziniĝo kaj prizorgo de familio, infektiĝas. Ili ne povas malatenti la fakton, ke tiu kariero ne plu konsistigas la solan eblecon. Almenaŭ en la teorio, ekzistas elekto. Kaj kun tiu konstato neeviteble aperas malkontento.

Ĉu tiu malkontento rezultas do nur el la propagando de la virina movado? Tio ne estas kredebla. Por sukcesi, movado devas kapti ian ekzistantan aŭ potencialan publikan senton. Kaj la virina movado klare estas pli ol subite aperinta modo. Ĝi estas fenomeno, kiu nun daŭras sufiĉe longe, kaj kiu troviĝas iugrade en preskaŭ ĉiuj landoj (aŭ ĉu eble en ĉiuj?). Do, kvankam la virina movado certe helpas la disvastigon de malkontento, oni devas vidi en ĝi ne tiom kaŭzon kiom simptomon de jam ekzistanta tendenco.

**Multaj virinoj nur kredas sin kontentaj.** Ni ĉiuj konas la stereotipojn de la plendema edzino, la fanatika dommastrino, la tro posedema patrino kaj la trudema bopatrino. Supozeble ekzistas viraj ekvivalentoj, sed ili ne havas la saman karakteron de rekonata socia fenomeno. Tiuj estas tipe virinaj problemoj.

Tiaj virinoj certe ne estas feliĉaj. Sed ili ĝenerale akceptas sian rolon en la vivo, kaj ne vidas en ties limigoj la radikojn de sia malkontento. Anstataŭe ili kulpigas aliajn homojn aŭ specifajn aspektojn de sia situacio: la ĉefa problemo estas nur tio, ke la edzo estas maldiligenta, aŭ la domo estas tro malgranda, aŭ la ŝatata filo ne estas sufiĉe bone prizorgata de la bofilino (kiu eĉ devigas lin helpi en la hejmo!). En akordo kun la socia postulo, tiaj virinoj investas la tutan vivon en la hejmo kaj familio. Ili ĵetas sin en tiun metion kun la sama dediĉo, kiel iliaj edzoj al siaj profesioj. Bedaŭrinde la familianoj kutime ne konsideras tiun laboron tiel grava kiel la patrino, aŭ ne pretas doni al ĝi tiom da atento. Ili ja havas aliajn interesojn por plenigi la tempon. Ili ne tre zorgas, ĉu la domo estas iom malpli ol perfekte ordigita, kaj fakte ili trovas la laboradon de la patrino nur konstanta fonto de ĝeno.

Kiam la familio plenkreskas, la rolo de la patrino, precipe en okcidentaj landoj, venas al fino. La infanoj foriras kaj ne restas multo farenda en la domo. En tiu periodo de la vivo, multaj virinoj deprimiĝas kaj sentas sin ne plu bezonataj, precipe se iliaj infanoj loĝas malproksime kaj ne ofte volas interŝanĝi vizitojn. Efektive, la mezuro, laŭ kiu tiaj virinoj perdas sian celon en la vivo, rekte rilatas al la grado de ilia antaŭa dediĉo al la rolo de patrino kaj dommastrino.

**Multaj viroj agas laŭ nedezirinda maniero.** Ekzistas emo supozi, ke tiuj virinoj, kiuj batalas por egaleco, aspiras la rajton agi kiel viroj. Tial oni mokas ilin, se ili ne sukcesas ĉiam subpremi siajn tipe "virinajn" trajtojn kaj ekzemple ploras aŭ esprimas timon. Certe ekzistis iam modo, ke sendependemaj virinoj imitis la konduton de viroj, portis virecajn vestaĵojn, kaj malestimis la tradiciajn okupojn de virinoj. Sed tiu sinteno baziĝas en la ideo, ke la normala



# Helpo al la „Tria Mondo" per la „Dua Lingvo"

de Thomas Bormann, FR Germanio

Lucerno 1979, UEA-kunveno pri regiona agado. Fine eblas diskuti kun kompetentuloj el multaj mondpartoj pri sukcesoj kaj venontjara agado en tiu ege grava laborkampo.

... La spertoplenaj fakuloj gvidis la publikon al jena konkludo: Oni ŝanĝu kelkajn latinidajn radikojn el la Esperanto-vorttrezoro al radikoj venantaj el afrikaj kaj aziaj lingvoj — kaj jen la fina venko.

Tio bedaŭrinde estas ne ŝerco, sed pruvo pri la senesperiga stato de regiona agado en la Esperanto-movado. Jam la enkonduka prelego de tiu lucerna kunveno maltrafis la veran problemon: "La Tria Mondo — ĉu ŝanco por Esperanto?"; kvazaŭ nia sola celo estus havi laŭeble grandan nombron de Esperanto-parolantoj kaj kotizpagantoj. Sed Esperanto ne povos pluvivi per esperoplenaj idealistoj kaj certe ne povos ekvivi en la Tria Mondo per aplaŭdantoj al la Zamenhofa idealo.

Esperanto devus funkcii kiel interkomprenilo ofertante al la homaro evidentajn avantaĝojn. Pensante pri regiona agado oni demandu: Kiel Esperanto povus helpi al tiuj homoj, kiuj ne vivas en riĉaj cirkonstancoj kaj eble ne-

agmaniero de viroj estas efektive pli dezirinda ol tiu de virinoj. Laŭ tiu supozo, virinoj nature strebas simili al viroj, sed kiu normala viro sopirus esti kiel virino?

Virino, kiu sukcesas en tradicie vira posteno, gajnas per tio admiron aŭ timon — kondiĉe ke ŝi neniam lasas fali la maskon por malkaŝi ian virinan econ. Kaj kio okazas, kiam viro kondutas kiel virino? Ju pli perfekte li ludas sian rolon, des pli oni malestimas lin. Tiu distingo fariĝas plej evidenta, kiam temas pri vestostiloj. Tra granda parto de la mondo, oni jam de longe ĉesis komenti, kiam virinoj portas virajn vestaĵojn. Sed kion oni opinias pri viroj, kiuj vestas sin kiel virinoj? (Tamen, la afero havas praktikan flankon. Viraj vestaĵoj certe estas pli oportunaj ol virinaj en multaj cirkonstancoj kaj postulas malpli da zorgo kaj pripenso. Sed ĉio havas sian ĝustan lokon. Argumenteble, tradiciaj virinaj vestaĵoj pli konvenas, kiam oni iras al balo.)

Feliĉe, la situacio ŝanĝiĝadas. En difinitaj landoj, viroj ja nun rajtas montri pli da "virinecaj" kvalitoj kiel emociemo kaj tenereco. Eĉ kiam temas pri vestaĵoj, ili povas porti pli larĝan gamon de koloroj, pli fantaziajn stilojn kaj, en kelkaj medioj, pli elegantajn frizurojn.

Mi ne intencas iri al la alia ekstremo kaj aserti, ke tradicie virinaj trajtoj estas superaj al tiuj de viroj. La socio ja bezonas foje fortajn, protektemajn, sendependajn homojn, kapablajn vidi ekster la limo de la familiaj interesoj. Sed ĉiuokaze, povus esti, ke multaj el la tiel nomataj "virinaj kvalitoj" aperas **reage al** la mala sinteno en viroj. Kial mem provi batali kontraŭ la zorgoj de la vivo, kiam alia homo volonte mem akceptas tiun ŝarĝon?

Tamen, tiu memstareco, kiun ni tiom flegas ĉe viroj, ne povas ekzisti sen la perdo de aliaj dezirindaj karakterizoj, ekz. sentemo al la problemoj kaj bezonoj de aliuloj. Kaj kelkaj viraj trajtoj estas rekte malavantaĝaj al la socio. Mi pensas precipe pri la agresemo kaj konkurencemo. En mia loĝkvartalo mi ofte vidas etajn knabojn batali surstrate. Tiu konduto estas tre malofta ĉe knabinoj. Eblus argumenti, ke knabinoj nature estas malpli agresemaj, sed mi preferas opinii, ke ili lernas sian agmanieron per imito de plenkreskuloj. Per rakontoj, filmoj kaj televidaj programoj, bedaŭrinde ankaŭ per la vivo, la infanoj lernas, ke la agresemo ligiĝas al la rolo de viro. Ne surprize, ke la knaboj komencas ekzerci sin; kaj cetere mi vidas nenian seriozan klopodon malkuraĝigi ilin.

Ekzistas opinio, ke la virinoj estas pli pacamaj ol la viroj. Mi ne kredas, ke ili nature estas tiaj, precize kiel mi dubas, ĉu viroj instinkte estas pli agresemaj. Tamen, tiu pacamo estas nepre fleginda trajto — ne nur ĉe inoj. De tempo al tempo aperas movadoj, kiuj celas utiligi tiun kvaliton de la virinoj por atingi nacian aŭ mondan pacon. Plaĉas al la viroj, ke la virinoj okupiĝu pri la temo, kaj ili estas pretaj subteni tiajn movadojn per internacia rekono kaj financa helpo. La sola afero, kiun ili ne pretas fari, estas klopodi mem ŝanĝiĝi. Kiun motivon ili havas por tion fari, dum ili daŭre supozas, ke la jama vira konduto estas tiu, por kiu ni ĉiuj strebas? Ne ekzistas granda espero, ke tiaj movadoj sukcesos, dum ili restas la tereno de homoj, kies opinioj ĝenerale ne ricevas seriozan konsideron ekster la sfero de la hejmo.

Mi jam atingis la finon de mia spaco, kaj mi ankoraŭ ne respondis la demandon, kiun mi metis ĉe la komenco de ĉi tiu artikolo. Anstataŭe, ŝajnas, ke mi sukcesis prezenti nur tion, por kio ni tre klare **ne** strebas. Sed eble estas plej taŭge, ke mi ne povas fini ĉi tiun serion per granda kulmina deklaro, sed nur per demandoj. Ĉar efektive ne eblas antaŭvidi, kiel la socio ŝanĝiĝus, se ni ĉesus kuraĝigi la evoluon de unu trajto en knaboj kaj de ĝia malo en knabinoj; se ni donus al la membroj de ambaŭ seksoj la saman eblecon fari ĉiujn taskojn (kio en si mem necesigus bazan ŝanĝon en niaj sociaj strukturoj); kaj se ni ne plu supozus, ke la interesoj de la du seksoj estas rekte kontraŭaj. Kaj se tiuj aferoj okazus, ĉu plu ekzistus diferencoj inter la du seksoj krom la fizikaj? Ĉu ni gajnus ion per tiu evoluo, aŭ ĉu ni nur perdus? Kiel ĝi influus la rilatojn inter la seksoj aŭ la pluan ekziston de la familio? Ĉu la rezulto efektive estus preferinda al la nuna situacio? Ni povas nur diveni la respondojn. Sed oni ja povas aserti, ke konstatinte kiel oni nun "konstruas" la tipajn karakterizojn de la du seksoj, oni ne plu povas senpripense antaŭeniri laŭ la sama vojo. Minimume oni devas halti por demandi sin, ĉu ni vere deziras resti en la malnova sistemo, aŭ ĉu ni eksperimentos por trovi novajn sistemojn, kiuj espereble estos pli bonaj. ▪

---

niam renkontos alilingvanojn? Ĉu la peno lerni Esperanton poste alportos al ili tiajn evidentajn avantaĝojn?

Eblan solvon de tiu problemo vi povas legi en revuo *Esperanto* de decembro 1977 kaj januaro 1978. En Irano Esperanto tiam spertis gigantan sukceson kaj d-ro Saheb-Zamani, la ĉefa instruisto de Esperanto, klarigis la kialojn en intervjuo kun d-ro Sadler, kiu konkludis el la interparoladoj, ke "la lingvaj problemoj de la Tria Mondo estas esence aliaj, ol tiuj de la cetera mondo". Nome ĝi estas "problemo de la lingvo de kleriĝo, de edukado". Nuntempe en la Tria Mondo tiun rolon ĉefe ludas la angla kaj franca lingvoj. Se persono emas studi iom pri ekonomio aŭ scienco, li aŭ ŝi unue devas lerni tian fremdan kaj komplikan lingvon. Ĉi tie Esperanto kiel tre facila lingvo povus helpi, se la movado liverus al la Tria Mondo unue lernolibrojn pri Esperanto, due literaturon por ili interesan en facila lingvaĵo, kaj trie sciencan kaj teknikan literaturon por ke ili povu kleriĝi en tiuj tre gravaj kampoj, kiuj estas necesaj por povi vivi en la hodiaŭa mondo laŭeble memstare, laŭeble sendepende. Tia agado helpus ĉesigi la kulturan imperiismon kaj krome iom pliseriozigus la proponon aljuĝi al UEA Nobel-premion.

Sed ĉu en nia movado vere ne ekzistas grupo da homoj, kiuj emus kaj kapablus ekagadi en tiu kampo? Vizitinte la lucernan kunsidon pri regiona agado oni povas nur seniluziiĝi.

Dum la 90-minuta kunsido evidentiĝis, ke la ĉeestintaj geavoj nenion lernis el la 'irana leciono' de antaŭ du jaroj. Tamen, estante optimisto mi esperas, ke la temo en Stokholmo ne denove estos "La Tria Mondo — ĉu ŝanco por Esperanto?", sed ekzemple: "Esperanto — ĉu ŝanco por la Tria Mondo?" ▪

Jen la fino de jarkolekto 1979. Al ĉiuj kontribuintoj al tiu kolekto *Kontakto* kore dankas. Al ĉiu gazeto kaj radiostacio, kiu menciis ion pri la revuo, dankon pro la atento. Al ĉiu, kiu dum la jaro iel kunlaboris kun aŭ donis subtenon al TEJO aŭ *Kontakto*, dankon ankaŭ.

**Sincerajn bondezirojn al ĉiu por la nova jaro!**

# LA KONTRIBUO DE Literatura Foiro AL

# LA ESPERANTO-KANZONO




**SPECIALAJ GASTOJ DE LA LITERATURA VESPERO**
**OKAZE DE LA PREMIADO DE**

## LA VERKO DE LA JARO

**LITERATURA FOIRO :** ANKAŬ DUM LA IJK
VIA KULTURA REVUO
EN ESPERANTO